

Iernolibroj kaj vortaroj

VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO



Boris Kolker (1939).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Dua, reviziita kaj
korektita eldono.
279p. 21cm.
ISBN 92 9017 078 6.
Prezo: € 18,00.

SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE



Audrey Childs-Mee
(1926-1990).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Sepa eldono.
234p. 21cm.
ISBN 92 9017 050 6.
Prezo: € 10,80.

POR ESPLORI PRI ETIMOLOGIO

KONCIZA ETIMOLOGIA VORTARO.

André Cherpillod (1930).
Rotterdam: UEA, 2003.
503p. ISBN 92 9017 082 4.
Prezoj: broŝ. € 19,80,
bind. € 24,90.



La plej kompleta kaj detala etimologia vortaro de Esperanto, kun parencaj etimoj en pluraj lingvoj. Ĉiuj fremdlingvaj vortoj skribitaj en la alfabeto de la koncerna lingvo kaj transliterumitaj al la latina alfabeto. Kvazaŭ aldono al PIV, kies granda difekto estas manko de etimologiaj indikoj.

VIA UNUA VORTARO



BAZA
ESPERANTA
RADIKARO.
Wouter F. Pilger (1942).
Rotterdam: UEA, 2001.
160p. ISBN 92 9017 076 X.
18cm. Prezo: € 7,50.

Bonega unua vortaro por studanto de Esperanto, kvazaŭ miniatura Plena Ilustrita Vortaro, per kies uzado oni ne nur lernas vortojn sed ankaŭ ekpensas en Esperanto. Pli ol 2700 radikoj klarigitaj per oftaj kaj kutimaj vortoj, kaj kun indiko pri iliaj ofteco kaj utileco.

**triona rabato por kia ajn kombino
de tri libroj ĉi-supraj (identaj aŭ ne)!**

ISSN 0014-0635

Esperanto

REVUO



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
96-a jaro • n-ro 1161 (7-8) • **Julio-aŭgusto 2003**

Ĉirkaŭaĵo de la ĉi-jara kongresurbo atendas la malkovron



Litova mozaiko

Kalendaro 2003

**Defendi
naciajn
kulturojn**

**Retkursoj:
Ĉu taŭga metodo
instrui Esperanton?**

**La lingva
interplekto
eŭropa II.**

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎, ✉ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org; revuo@nextra.org

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anoncarifito (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964 SWIFT: PSTB NL21)

42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.



ke kvankam la julia-aŭgusta revuo estis preparita antaŭ la gotenburga kongreso, vi trovos ĝin en via leterkesto – post la kongreso. Nur la retaj abonantoj ĝuos la escepton. La prokraston kaŭzis neplanita helpo ĉe finpretigo kaj presado de Jarlibro 2003, por ke ĝi aperu antaŭ la ĉi-jara UK. Tiuj, kiuj kongresos en Svedio, ricevos surloke etan rekompencon: la Jarlibron. La ceteraj ricevos ĝin kun ĉi tiu numero iom pli poste. La redaktoro petas vin pri indulgo kaj komprenemo. Feliĉe la ĉi-somera artikolbukedo ne riskas velki pro la eta prokrasto. La unuopaj floroj ja certe havas longdaŭran, se ne eternan valoron. Bonan legadon kaj ĝis revido dum, respektive post la kongreso!

Stano

Enhavo

- 147 Malferme: Defendi naciajn kulturojn (Mikaelo Lineckij).
148 Alfronti la veron (Thierry Saladin).
149 Dekmiloj da eŭroj al litovaj esperantistoj (Marko Naoki Lins).
150 Litova mozaiko (Povilas Jegorovas).
152 Retkursoj: Ĉu taŭga metodo por instrui Esperanton? (Marko Naoki Lins).
153 KALENDARO 2003.
156 La lingva interplekto eŭropa II. (Claude Piron).
158 RECENZOJ: Zajdman Jefim pri *Venu rapide homo*. Pavel Moĵajev pri *Simbiozo*. Paul Gubbins pri *Les bases de l'esperanto d'après le fondamento kaj Basis of Esperanto*. Jukka Pietiläinen pri *Libera Folio*.
161 LASTE APERIS.
162 LOKE-FAKE.
163 Membro-Membron! PERSONE. OFICIALA INFORMILO. ANONCETOJ.
164 TRA LA MONDO: Fervojistoj kongresis en Saksio (Stano Marček). Novaĵoj el Barcelono (Salvador Aragaj).
165 Condomínio Esperanto (Aloisio Sartorato). Hungaroj en Tata (Oszkár Princz). Subteno E-movadan en Afriko! (Jenja Zvereva).
118 FORPASOJ. Krucenigma konkurso (Stano Marček).

KOVRILPAĜE: Norde de Gotenburgo situas, sur insulo, urbeto Marstrand, kun fortikaĵo Carlstens Fästning el la 14-a jarcento. Marstrand estas la celo de duontaga kongresa ekskurso.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategia forumo, strategio kaj planado, Unesko): d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ renato@esperanto.org.
Vicprezidanto (kulturo, esploro kaj dokumentado): prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford CT 06107, Usono; ☎ +1-860-561-26-69 [h]; ✉ +1-860-561-52-19 [h]; ☎ +1-860-768-44-48 [of]; ✉ +1-860-768-44-11 [of]; ✉ tonkin@mail.hartford.edu.
Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎ +82-53-765-0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; ✉ +82-53-652-8141 [of]; +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjoj): s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio; ☎ +385-(0)21-535-650 [h]; +385-(0)21-355-550 [of]; ✉ +385-(0)21-393-597 [of]; ✉ osibov@pravst.hr.
Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelensir. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎ / ✉ +31-(0)20-642-18-53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.
Eduko, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado: s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-227-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.
Informado, rilatoj kun TEJO: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎ +7/83336/59856; ✉ volg@uea.org.
Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ michela.lipari@esperanto.org.
Observanto de TEJO: s-ro Marko Naoki Lins.
Observanto de ILEI: s-ro Maŭro La Torre.

Defendi naciajn kulturojn

Mikaelo Lineckij

Verŝajne multaj el vi sentas la gravecon de la nuna situacio. Denove komencis aperadi kontraŭ-Esperantaj artikoloj, diraĵoj ktp. Bonege! Tio signifas, ke nia ioma aktiviĝo estas rimarkita!

Mi opinias, ke ankaŭ nia multjara tolerema konduto rilate al la angla donis sian rezulton, sed ĝi estas ne tro pozitiva, ĉu ne? Ni humile atendas, ke la ĉirkaŭa mondo atentis nian inteligentecon kaj oni komencos persekuti nin kun la krioj: *Ni konsentas, ke Esperanto estas la plej bona solvo de la monda lingva problemo! Helpu enkonduki ĝin tutmonde!*...

Kaj kion faras en tiu tempo la angla? Ĝi, simile al nerapide iranta tanko, kontente murmuranta per potenca motoro kaj malavare provizata per petrolo, subpremas la mondon.

Min mirigas kiel ŝtatpotenculoj preskaŭ zombie defendas la solvon de la lingva problemo nur pere de la angla. Iel feble oni parolas ankaŭ pri varianto, kiam ĉiu lernu 3-4 lingvojn.

La dua situacio memorigas provojn modernigi vapor-lokomotivon, fermante la okulojn al la fakto, ke ekzistas signife pli potencaj kaj pli ekonomiaj dizela aŭ elektra lokomotivoj.

Simile nia agado, direktita same kiel antaŭe al provoj disvastiĝi Esperanton en la popolo ne multe sukcesas. La rezulton ni ĉiuj bone vidas – nun ĉiam pli malfacilas motivigi al homoj, precipe al la junularo, la neceson lerni Esperanton, kiam oni energie lernas la anglan kaj vidas, ke tio donas pozitivajn rezultojn en la plua vivo. Eble jam venis la tempo direkti nian agadon ne al persvado de ni mem pri la bonecoj de la justa solvo de la problemo, sed al tiuj, de kiuj vere dependas la decido. Ni ĉiuj en niaj landoj bone vidas la rezultojn de la anglalingva invado – la naciaj lingvoj pli kaj pli asimiliĝas kun la angla.

Strange, ke oni tute ne asocias la enorman instruadon de la angla kun tiu minaco. Estas nature, ke bone ellernitan lingvon oni inklinas uzi. Malgraŭ tio, ke oni insistas pri vasta kaj profunda lernado de la lingvoj por uzi ilin en komunikado kun la ekstera mondo, oni pli kaj pli vaste uzas (99%-e) la anglan interne de la landoj. Fakte estas kreita reĝimo de pleja favoreco por homoj, kiuj kvante konsistigas nur 8% de la monda loĝantaro.

Antaŭ nelonge aperis trafa serĉo: – Kiel nomiĝas homo, scipovanta multajn lingvojn? – Poligloto. – Kiel nomiĝas homo, scipovanta du lingvojn? – Bilingvulo. – Kiel nomiĝas homo, scipovanta unu lingvon? – Usonano. Certe temas ne pri usonaj esperantistoj kaj ne pri tiuj nemultaj usonaj stranguloj, kiuj okupiĝas pri lernado de fremdaj lingvoj. Se iu ofendiĝis pro la serĉo, mi anticipie pardonpetas...

Laŭ mi ĝuste nun estas bona momento proponi apliki Esperanton kiel alternativan varianton por la internacia komunikado en ĉiuj niveloj – de la popola ĝis la ŝtata.

Ja ĉiuj komprenas, ke EU estas kreita kiel alternativo al la Usona potenco. Same eŭro estas alternativa al la monde uzata dolaro. Kial ni ne uzu tiujn argumentojn en nia agado? Verŝajne

ĝuste esperantistoj estas tiuj homoj, kiuj plej bone vidas la malpurigon de siaj denaskaj lingvoj kaj povas argumente alarmi kaj moviĝi tiudirekte, aligante al tiu movado ankaŭ neesperantistojn.

Antaŭ du jaroj al mi venis ideo, kiel eblas fari bonan simbiozon por promocii Esperanton kiel defendilon de la kulturo kaj lingvo, estanta unu el la ĉefaj konsistaĵoj de kulturo. Pasintjare estis registrita Societo por subteno kaj defendo de la ukraina kulturo "Espero", kies laborlingvoj estas la ukraina kaj Esperanto.

Kion signifas la subteno? Tio estas konatigo de eksterlandanoj kun ukrainaj kulturo kaj historio pere de Esperanto. Kulturo estas verŝajne la sola varo, kiu ne timas konkurencon – ĉiu popolo ja havas sian unikan nacian kulturon. Kion signifas la defendo? Tio estas atentigo de la potenculoj pri minaco al la kulturo kaj la lingvo flanke de (ĉefe) la sennacia, t. n. "amasa" usondevena kulturo.

Certe, neniuokaze mi alvokas al batalo kontraŭ la angla – oni povus nin tre nekorekte kompreni. Necesas strebi al subteno de praktika apliko de Esperanto en la ŝtata nivelo. Bona ekzemplo por ni estas interreto – kiam neniu premas Esperanton, ĝi mem montras sian potencon kaj okupas indan pozicion. Se ni sukcesos atingi ŝtatan subtenon por la komenco almenaŭ en kelkaj landoj, oni konvinkiĝos pri la utileco de nia lingvo.

Se iu el vi ekinteresiĝis, mi invitas viziti la tt-ĉejon de la Societo www.espero.kiev.ua, en kiu estas respigitaj la agado kaj planoj de la Societo. La tt-ĉejo estas dulingva – ukraina kaj Esperanta.

Tre gravas, ke la agado estas societila kaj Esperanto estas uzata laŭ sia destino – esti laborinstrumento por la komunikado. Se tiu agado estas/os sukcesa, de ĝi profitos kaj la naciaj kulturoj kaj Esperanto.

Kaj nun mi volas turni min al tiuj esperantistoj, kiuj volas praktike promocii Esperanton al vere serioza nivelo. Mi pretas lanĉi Internacian Asocion de Kulturdefendaj Societoj – AKSO. Ĝi ne planatas esti Esperanto-organizo – Esperanto estu nur ĝia laborlingvo, sed kunlabori kun UEA – jes.

Mi proponas sloganon por la Asocio – *La sola rimedo, kiu povas savi naciajn kulturojn de la angligo – estas Esperanto!*

Malpacience mi atendas reeĥojn, konsilojn, konsiderojn kaj sugestojn. Ni faru ĉion eblan por ke la *bela sono de l' homaro por eterna ben' efektiviĝu!*

Mikaelo Lineckij
Gvidanto de Societo por subteno kaj defendo de la ukraina kulturo Espero, lineckij@ukrpost.net





Esperanto estas lingvo preskaŭ nekonata en Francio. Kvankam kelkaj povus aserti la malon, estas nerefutebla fakto ke sepdek procentoj de nia junularo tute ne povas respondi la elementan demandon: *Kio estas Esperanto?*

Cetero, tiu konstato validas ne nur en Francio, sed en ĉiuj landoj, almenaŭ en la okcidenta parto de Eŭropo. Plie, se vi eldiras tiun vorton kaj proponas kelkajn priprenojn por nutri debaton, ekzemple post kiam lingvisto prelegis pri lingvaj problemoj en Eŭropo, la ĉeestantaro aŭ silentas, aŭ ridas. Kaj se vi aŭdacas rebati, ĉefe se la preleganto ĵus diris ian malverjaĵon (ekzemple: *Esperanto ne estas kultura lingvo* ktp.), oni silentigas vin: *Silentu, sinjoro, la profesoro Tia-tia ja ĵus diris, ke Esperanto ne estas lingvo, do ne insistu. Li eĉ afable respondis al vi, do sufiĉas!* Kiuj ne kredas min, tiuj bonvolu legi la verkon de Claude Piron: *Le Défi des langues* (la Defio de la lingvoj). Ĉio estas bone analizita kaj mi travivas tion de ses jaroj. Pri kio temas?

Farinte tiun konstaton jam en 1997, kiam mi mem interesiĝis pri Esperanto, mi kun geamikoj fondis asocion, kies projekto konsistas el la instruado de la lingvo al senlaboraj gejunuloj, kaj post kiam ili atingas la nivelon de la *Atesto pri Kapableco*, mi dungas ilin kiel profesiajn esperantistojn. Ilia laboro konsistas el vizitado de lernejoj por prezenti al gelnantoj la lingvon kaj ties valorojn. *Jen genia ideo!* asertis kelkaj, sed aldonante, ke ili faros nenion pro personaj kialoj.

Ĉu vere tiu ideo estas genia? Eble surpapere, sed praktike ĝi estas ege malfacila pro manko de subteno homa kaj financa. Eĉ se mi tute ne forgesas la multnombrajn esperantistojn, kiuj ekde la naskiĝo de la asocio komprenis la gravecon de la agado, kaj senĉese subtenis ĝin finance, estas vere, ke tiu projekto havas antaŭ si multajn obstaklojn. Ekzemple, junuloj, kiujn ni renkontis, interesiĝis pri la afero, sed la postan tagon multaj rifuzis aŭ tute ne respondis. Oni povas imagi, kion diris al ili la gepatroj: *Ne perdu vian tempon per Esperanto. Antaŭ longe via avo lernis Esperanton, sed neniun plu parolas ĝin en la mondo. Estis bona ideo, jes, sed ĝi apartenas al la pasinteco. Nun lernu la anglan...*

Mi estas kuracisto. Tamen, ĉar mi estas pli-malpli kuraĝa aŭ freneza (elektu mem), vidante la malfacilaĵojn, kiujn mi renkontis dum du jaroj, mi dediĉis mian tutan tempon por antaŭenigi la projekton. Kaj ĝi antaŭenigis, jes ja. Mi eĉ estis rekompencita kiam mi renkontis Zohran.

Tio okazis fine de 1999. Ŝi estas bela junulino, 23-jara. Ĉar berber-devena, ŝi tuj komprenis la seriozecon de la projekto kaj ankaŭ la valoron de la lingvo. Same kiel al la aliaj, mi instruis al ŝi la lingvon dum ĉirkaŭ sescent horoj, kaj la asocio

dungis ŝin komence de 2001. Mi precizigas, ke la laborkontrakto estas nedifin-daŭra. Do estas vera laborposteno. De post la dungado ŝi vizitadas lernejojn. Mi mem vizitadis aliajn lernejojn ekde la komenco en 1997. Kaj la afero iris pli rapide, sed ĉiam ni alfrontis la samajn obstaklojn. Por renkonti gelnantojn, necesas ricevi permeson de la estroj aŭ de la instruistoj, kiuj plej ofte reagas al Esperanto same kiel tiuj, kiuj ridas, aŭdante la vorton Esperanto.

En Francio la instruistoj, same kiel la ĝenerala publiko, scias nenion pri Esperanto. Kaj se vi insistas (fidu min, ni ja insistas), ili klarigas al vi, ke ili havas aliajn, pli gravajn zorgojn ktp. Resume, ili ne scias, sed ĉefe ili deziras scii nenion. Ĉu mi troigas? Tute ne! Sed ĉar ni insistas, ni tamen sukcesis prezenti Esperanton al ĉirkaŭ naŭmil gelnantoj. Kredu min, tiuj ĉi opinias, kion ili volas pri Esperanto, sed ili ja scias pri kio temas, kiu estis Zamenhof, kaj kia estas la lingvo.

Post sesjara aktivado, ni eĉ sukcesis subskribi kun kvar kolegioj aŭ gimnazioj kontrakton por instrui (kontraŭpage, nature) la lingvon. Sed bedaŭrinde ni mem taksas mikroskopa la rezulton de nia laboro, se oni konsideras la necesan energion, se ne paroli pri financaj aspektoj, ĉar ni estas neprofitcela asocio.

Kiel do venki la psikologiajn barilojn, kiujn ni alfrontas? Kelkaj asertas, ke *sufiĉus ke la politikistoj decidu*, dum aliaj ekde la komenco diris al ni, ke nia projekto estas utopia. Aliaj aldonis ke estus bone, se okazus debato pri lingvaj problemoj... Ĉu vere la politikistoj pensas pri Esperanto, kiam tiom da homoj ĉu kredas ĝin mortinta,

ĉu ne scias, ke ĝi ekzistas? Ĉu vere ekzistas lingvaj problemoj en Eŭropo? Fakte, jes, sed nur ni esperantistoj opinias tion. La socio pli malpli funkcias sen Esperanto, kaj ĝi estas eĉ tute fora de la ĉiutaga vivo de la civitanoj. Ĉu vere iun tagon la respondeculoj venos al ni, dirante: *Ja vi, esperantistoj, pravas de pli ol unu jarcento. Ni ne revu. Nur kiam la civitanoj, bone informitaj, postulos, ke oni enkonduku Esperanton en la vivon, en la instru-programojn, tiam la politikistoj interesiĝos pri nia afero, kaj ne antaŭe. Kial ili interesiĝu pri nia afero, se ili faris nenion por ĝi de post la naskiĝo de la lingvo? Pro kiu mistera kialo ili irus kontraŭ la opinio de la homoj? La ĉi lastaj tute fajfas pri Esperanto. Kaj eĉ rigardas ĝin kiel sekton!*

Kion fari? Ni multe pripensis la aferon kaj kreis banderolon, sur kiu estas france skribita la slogano *Eŭropo havas*

ununuran valuton, eŭron, ĝi bezonas komunan lingvon, Esperanton. Ni ne subtenas la ĝisnunan Eŭropan Unuiĝon, sed profitas de la okazo por eniriĝi mesaĝon en la kapojn. Kaj, bonŝance, multaj esperantistoj en Francio kaj en Belgio komprenis tion. Ni jam vendis la banderolon pomile, kaj nun ĝi estas tradukita en diversajn lingvojn.

Por ricevi tiun belaspektan memglueblan bendon, ni elspezis 11 000 eŭrojn inkluzive de la modeloj tradukitaj en lingvojn de landoj, kiuj elektis eŭron. Okaze de la UK en Svedio s-ro Parisot-Delourmel, sekretario de nia asocio (KN=514), prezentos ĝin al interesiĝantoj. Temas pri gluado de la bendo sur malantaŭajn vitrojn de veturilo, por ke aŭtomobilistoj vidu ĝin dum urbaj trafikstopiĝoj.

Ni opinias, ke rigardante ĝin, oni pripensos la aferon alimaniere aŭ tuj diskutos pri ĝi. Oni povus diri, ke se Eŭropo

elektus Esperanton kiel komunan lingvon, ĝi perdus sian neŭtralecon. Tiu argumento meritas seriozan atenton. Sed aliflanke se la movado maltrufas la nunan historian momenton, alivorte, se la angla-usona iĝus la lingvo de Eŭropo, kiom da esperantistoj estus pretaj veti eŭron pri la estonteco de nia bela lingvo?

Dum tutmondiĝo regas, kia defio staras antaŭ ni? Ni nepre ne perdu tempon. Esperanto montriĝu, ĉie!

D-ro Thierry Saladin


Asocio Réinsertion et Espéranto
26 rue Enclos Fermaud, FR-34000 Montpellier,
apsike1997@yahoo.fr, http://
reinsesperanto.multimania.com

Dekmiloj da eŭroj al litovaj esperantistoj

Elkoran gratulon al via bona sukcesa laboro. Mi ja povas diri ke la Universala Kongreso en 2005 estos granda sukceso, diras Lee Chong-Yeong, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio. La gratulo koncernas la decidon de la litova registaro doni ĉirkaŭ 14 500 eŭrojn al Litova Esperanto-Asocio (LEA) por parte financi komencajn organizaĵajn laborojn de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta inter la 23-a kaj 30-a de julio 2005 en Vilno.

La mono estos uzata por eldonado de literaturo pri Litovio en Esperanto. Tio estas nur malgranda parto de la financa subteno atendata de Litovia Registaro por diversaj projektoj de LEA, ligitaj kun la venonta UK en Vilnius, fieras Povilas Jegorovas, la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Financa subteno estas atendata ankaŭ de urbaj instancoj de Kovno kaj Vilno, kie okazos kelkaj aranĝoj, ligitaj kun la UK.

Sed raporteblas sukcesoj ne nur ĉe la UK-fronto: ĵus aperis libro pri teknologio, kiu enhavas artikolon de la direktoro de la Vilna teknika kolegio kaj estrarano de LEA Algimantas Piliponis *La internacia lingva komunikado kaj nuntempa mondo* en la litova lingvo. La artikolo temas pri la rolo de Esperanto en internacia komunikado. Same aperis biografio *Homoj de regiono Kaisiadorys. 100 biografioj*, esploranta la vivon de Stasys Tijunaitis (1888-1966). Tiu fama litova esperantisto estis ankaŭ vaste konata pedagogo, ĵurnalisto, landesploristo kaj membro de la Litovia parlamento en 1920. Tijunaitis aperigis lernolibron de Esperanto por litovoj en



1912, partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn, instruis Esperanton kaj korespondis kun Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Pli frue oni jam eldonis broŝuron pri Tijunaitis, kiu enhavas apartan ĉapitron *Korespondanto de Zamenhof, aŭtoro de lernolibro*.

Aŭtoportretoj estas alia libro ĵus aperinta, kiu enhavas rakontojn pri 22 famaj homoj de Vilno kaj ĉapitron pri Valdas Banaitis (naskiĝinta en 1942), fama litova esperantisto, kuracisto-psikiatro kaj arda artikolanto. Banaitis rakontas pri siaj vivo kaj mondkoncepto, tre multe pri sia esperantista agado. Lia tuta familio estas esperantista. Aperis krome libro *Datoj de vivo kaj agado de Antanas Poška*. Oni povas legi tie diversajn faktojn el lia esperantista agado.

Marko Naoki Lins

Por gratuli aŭ kontakti: Litova Esperanto-Asocio
ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio. ☎ ofica +370 37 208503,
☎ +370 37 228616, ✉ litova.ea@gmail.lt;
Filio en Vilnius, ab.k. 178, LT-2000 Vilnius, Litovio. ☎ ofica
+370 5 2391078, ☎ +370 5 2391121, ✉ irenaa@takas.lt



Litova mozaiko

El Litovio venas pozitivaj novaĵoj pri la preparoj al la 90-a UK en 2005. Kreskas E-aktivaĵoj, aperas novaj libroj pri kaj en Esperanto. Jen plua bukedo da informoj, venintaj de la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas.

Kolora informilo

Laŭ preparprogramo al la 90-a UK, Litova Turisma Fondaĵo kaj Litova Esperanto-Asocio eldonis koloran grandformatan 28-paĝan turisman informilon *Litovio. Jarmilo en Eŭropa centro*. La tekston tradukis vilna esperantisto-jurnalisto Laimius Straznickas. Sur la lasta kovrilpaĝo estas oficiala emblemo de la 90-a UK kaj enestas foto de la monumento al Ludoviko Zamenhof en Veisiejai.

Broŝuro pri Vilno

La Turisma Fako de la litova ĉefurbo eldonis koloran grandformatan 20-paĝan informilon *Vilnius. Neforgesibla harmonio kaj ĉarmo*. Ĝi estas identa kun alilingvaj versioj de la eldonaĵo. La frontpaĝo surhavas la oficialan emblemon de la 90-a UK. La prospekton pri Litovio kaj la informilon pri Vilno eblos ricevi dum la Gotenburga UK ĉe la budo "Venontaj kongresoj" kaj "Litova stelo". Landaj perantoj de UK-oj, organizantoj de karavanoj kaj landaj asocioj povas ricevi senpage stokon. Poste ili estos akireblaj ĉe Litova E-Asocio.

Buntaĵoj de la lingvo

Eldonejo Sviesa en Kovno aperigis popularan libron de la konata lingvisto Jonas Sukys *Kalbos margumynai* (Buntaĵoj de la lingvo). El la 246 paĝoj de la libro 8 paĝoj estas dediĉitaj al artefaritaj lingvoj kaj Esperanto, aparta ĉapitro nomiĝas *Dirbtinis kalbos* (Artefaritaj lingvoj). La aŭtoro tre pozitive skribas pri Esperanto.



La prezentado de la ekspozicio pri Esperanto en la publika biblioteko en Trakai proksime de Vilno. Parolis la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas, parlamentano kaj esperantisto Stasys Kruzinauskas k.a.

Litova Radio en Esperanto

La eldonejo Varpas en Kovno eldonis libron de Stasys Stikelis *Eterio sviesa* (Lumo de etero), kiu estas detala historio de Litova Radio inter 1919 kaj 1940. La libro havas ĉapitron *Multlingva etero* pri la radioelsendoj en Esperanto en 1927-1939. Tiam Litova nacia Radio el la tiutempa ĉefurbo Kovno disaŭdigis lecionojn de Esperanto kaj konstantajn informojn pri Litovio en Esperanto por eksterlandaj aŭskultantoj. La unua parolisto estis Antanas Poška. Esperanto en radio aperis kiel la unua post la litova, nur poste oni komencis disaŭdigi en la germana, franca, pola, angla kaj aliaj lingvoj.

Vojo de landesploristo

La eldonejo Gabija en Kovno aperigis libron de la konata pentristo Leonas Juozonis *Krastotyryninko kelias* (Vojo de landesploristo), okaze de lia 80-jariĝo. La aŭtoro rakontas pri siaj vivo, laboro, atingoj, kaj rakontas pri siaj interesiĝoj pri Esperanto kaj kunlaboro kun esperantistoj. Enestas tutpaĝa genealogia arbo de la familio Zamenhof.

Sukcesa E-kurso

La 13-an de junio en Kovno, en Litova Esperantista Domo, finiĝis monata intensa ĉiutaga kurso de Esperanto. Gvidis ĝin konata Cseh-instruistino el Pollando Ewa Bondar. Estis du grupoj: la daŭrigan kurson frekventis 21 esperantistoj kaj la perfektigan grupon vizitis 15 esperantistoj. Fine de la kurso ĉiuj ekzameniĝis kaj ricevis atestejn de Litova Esperanto-Asocio. Sekvaj E-kursoj okazos komence de oktobro.

Sub la ĉielo de Dzukija

La ŝtata eldoncentro en Vilno aperigis libron de Antanas Pupienis *Po Dzukijos dangumi* (Sub la ĉielo de Dzukija). Dzukija estas suda parto de Litovio, kies loĝantoj havas sian dialekton kaj apartan vivmanieron. La libro priskribas la urbeton Veisiejai, kie en 1885 loĝis kaj laboris Ludoviko Zamenhof.

Tri filmoj en Esperanto

En Vilno aperis 20-minuta Esperanta filmo pri Litovio *Baltmara sukceso*. Ĝi estas el la serio de filmoj dediĉitaj al esperantistoj, por ke ili povu konatiĝi

kun la lando de la 90-a UK en 2005.

La dua, 36-minuta filmo en Esperanto pri Litovio, havas la titolon *Kaunas. Urbo ĉe riverkunfluo*.

La titolo de la tria, 45-minuta filmo pri Litovio, estas *Litova kalendaro. Festoj, moroj, tradicioj*.

Ĉiuj tri filmoj ekzistas en du versioj: videobendo kaj kompakta disko. La filmojn eblos spekti dum la UK en Gotenburgo. Post la UK ili estos aĉeteblaj ĉe UEA kaj ĉe Litova Esperanto-Asocio.

Stratoj de esperantistoj

La eldonejo Aesti en Kovno aperigis libron en la litova lingvo *Kovno: Stratoj kaj homoj*, en kiu oni priskribas homojn, kies nomojn portas stratoj de Kovno. Oni detale priskribas la unuan litovan esperantiston Aleksandras Dambrauskas (pseŭdonomo Adomas Jakstas), la aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto por litovoj, aperinta en 1890, la unua prezidanto de Litova E-Asocio kaj ĝia fondinto en 1919, la unua redaktoro de *Litova stelo*, aŭtoro de kelkaj libroj en Esperanto, tradukinto de litova poezio al Esperanto k. s. Tiutempe li estis unu el la plej famaj homoj en Litovio – poeto, literatura kritikisto, filozofo, prelado, profesoro, publicisto, politikisto, eĉ matematikisto. Dambrauskas persone konis Zamenhof kaj korespondis kun li. Enestas ankaŭ duonpaĝa artikolo pri la aŭtoro de Esperanto.

Kurso por E-instruistoj

Ekde la 24-a de majo ĝis la 15-a de junio 2003 okazis en Kovno, en Litova Esperantista Domo, semajnfina kurso por E-instruistoj. Gvidis ĝin Ewa Bondar kaj partoprenis estontaj E-instruistoj el

10 urboj de Litovio. Partoprenis 26 personoj, el kiuj 16 ekzameniĝis.

Ekspozicio

Ekde la 30-a de junio ĝis la 21-a de julio en la publika biblioteko de distrikta urbo Trakai proksime de Vilno funkcias ekspozicio pri Esperanto. Iniciatis ĝin juna esperantistino Olga Baskir. La 9-an de julio okazis publika prezentado de la ekspozicio, dum kiu parolis la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas, la parlamentano kaj esperantisto Stasys Kruzinauskas k.a.

Libra Printempo

Inter la 11-a kaj 13-a de aprilo 2003 okazis en Vilno, en Respublika Instruista Domo, la tradicia foiro Libra Printempo. En la stando de LEA (v. la fotojn) oni povis vidi kaj aĉeti librojn en la litova lingvo pri Esperanto kaj librojn en Esperanto. Funkciis konstanta ekspozicio *Ĉio pri Esperanto* kun libroj, revuoj, fotoj kaj afiŝoj. Pri la librofoiro vaste informis amas-komunikiloj. En ĉiuj informoj oni anoncis la partoprenon de LEA. Lige kun la foiro okazis 18-minuta radia programo ĉe ronda tablo kaj elsendo de la litova nacia televido.

Kovertoj pri Poŝka

Okaze de la 100-jariĝo de Antanas Poška Litova Poŝto eldonis du specialajn kovertojn. Unu koverto montras portreton de Poŝka kaj unuatan poŝtan stampon, la alia havas gravuraĵon kaj subskribon. En granda kvanto estas presita portreto de Antanas Poška en bildkarta formato kun subskribo, kie temas ankaŭ pri lia esperantisteco.



Cent enigmoj



Eldonejo Algarve en Vilno aperigis litovlingvan libron *Cent enigmoj de lingvo* (Simtas kalbos misliu), kies aŭtoro estas la konata litova lingvisto Algirdas Sabaliauskas. Kelkaj ĉapitroj estas rekte ligitaj kun Esperanto, ekz. kiajn ligojn Zamenhof havis kun Litovio, kiu verkis la unuan lernolibron de Esperanto por litovoj, ĉu eblas elekti internacian lingvon voĉdonante k.s.

E-grupo en eldonejo

Litova Esperanto-Asocio kontraktis kun la plej prestiĝa eldonejo en Vilno, Eldona Instituto pri Sciencaj kaj Enciklopediaj Libroj, pri eldono de fundamentaj libroj pri Esperanto, lingvo-problemo k.s. Ekde la 1-a de julio en la instituto laboras Esperanto-grupo kaj enoficigitaj estas du sciencaj redaktoroj, kiuj zorgos pri la preparo de la libroj. La grupon gvidas eldonisto kaj esperantisto Adomas Mecislovas Grippedis. Ĝis la jarfino en la eldonejo aperos sep libroj en la litova lingvo, preparitaj de la grupo, ekz. Ulrich Lins: *La danĝera lingvo*. Claude Piron: *Le Défi des langues*; Laurynas Algimantas Skūpas: *Lernolibro de Esperanto*; Telesforas Lukoševičius: *Elementa kurso de Esperanto*; Aloyzas Urbonas, Povilas Jegorovas: *Mi estas soldato de Esperanto*. La eldono de la libroj kune kostos 187 420 lidojn (54 325 eŭrojn).

Infana libro

Ĝus aperis kolora ilustrita grandformatata porinfana libro de la konata litova verkisto Jeronimas Laucius *La tria frato Teoristo*. La libron la eldonis eldonejo Trys zvaigždutes (Tri steletoj), kies posedanto kaj ĉefredaktoro estas la verkisto. Temas pri la centa libro de la verkisto kaj la unua en Esperanto. El la litova tradukis Valdas Banaitis, redaktis Gediminas Degėsys, la iniciatinto de kunlaboro inter esperantistoj kaj la eldonejo. La aŭtoro estas la prezidanto de la asocio "Litova porinfana libro". Ilustris ĝin lernantoj de arta lernejo en la litova urbeteto Vievis kaj iliaj instruistoj. La libro samtempe aperis en la litova (8000 ekz.). Sur la lasta paĝo ĝi havas duonpaĝan tekston pri la aŭtoro kaj liaj verkoj en Esperanto. Temas pri bonega reklamo de Esperanto. La libroj de Jeronimas Laucius ĝis nun aperis en la germana, pola, belorusa kaj rusa lingvoj. La libron oni povos akiri en la Libroservo de UEA kaj ĉe Litova Esperanto-Asocio. Ĝi estos aĉetebla dum la Gotenburga UK.



Retkursoj: Ĉu taŭga metodo por instrui Esperanton?



Pli kaj pli da novaj esperantistoj lernas pere de la reto. La reto iĝis esenca ilo por Esperanto en la tuta mondo. Pro tio ke la reta Esperanto-lernado eksplodas, indas nun ekscii iom pli pri tiu fenomeno, pri didaktiko, statistiko kaj kiom da homoj nuntempe rete lernas Esperanton.

Ni prezentu ĉi tie kelkajn retajn kursojn: *La brazila Kurso de Esperanto celas al tre internacia publiko*, diras Paul Ebermann, mentoro de la germanlingvaj paĝoj de la retkurso. *Fine de ĉiu leciono estas taskoj, kiujn la lernanto solvu. Tiujn solvojn li povas sendi retpoŝte al "mentoro" (kursestro), kiu korektas la erarojn. La defia projekto akiris ekzemple en Germanio intertempe 52 lernantojn kaj 19 mentorojn. Entute kvar lernantoj ĝis nun faris la finan ekzamenon. Germana Esperanto-Junularo tre subtenas la kursoprojekton. Ĝi donas provmembrecon de unu jaro al ili, se ili estas ĝejnuloj, klarigas Ebermann.*

La kurso, elŝutebla lernprogramo, tradukita al pli ol dek lingvoj, jam famiĝis en la movado. *En la tempo de Zamenhof, tiu komunikado okazis ĉefe per letero, klarigas la kreinto de la kurso, Carlos Alberto Alves Pereira. Esperanto jam ne profitis la rimedojn de radio kaj televido. Analoge, nun Esperanto ne povas preteratenti la helikopteron de interreto, filozofiumas Carlos. Li verkis profesion kaj senpagan programon, kiu eĉ instruas la elparolon de Esperanto. Grave estas, ke mi povas instrui ne forirante el la hejmo kaj povas korekti la taskojn en libera momento, emfazas Danuta Kowalska, kiu instruas en Israelo laŭ la brazila kurso. Kiam ne estas volontuloj por klubaj kursoj, estas bone ne perdi almenaŭ tiujn, kiuj volas lerni interrete. Por ili ĉi tiu formo estas ankaŭ pli komforta. Poste ili korespondas, povas partopreni en Esperanto-aranĝoj kaj elekti sian vojon. Junularaj hobiaĵoj estas komputilo kaj interreto, tial ili estas la vojoj sur kiuj oni povas trovi la lernantojn.*

Axel Rousseau mastrumas la francan version de la *Kurso de Esperanto*. Ni havas samajn rezultojn kiel en Germanio. *Male al Germanio niaj lernantoj venas el la tuta franclingvio. Ni havas lernantojn 60%-e en Francio, sed ankaŭ en Belgio, Kanado, Algerio kaj Svisio, aldonas Rousseau. Bedaŭrinde ĝis nun nur unu sukcese finis la kurson. Interesan statistikan materialon Rousseau ofertas ĉe <http://ikurso.esperanto-jeunes.org/stat-fr.html>. Tie li bildigas la geografian devenon*



de la studentoj. La reta adreso de *Kurso de Esperanto*: <http://www.kurso.com.br/eo/>.

Samaltnivela retursa projekto kiel la brazila certe estas *lernu!*, kiu alportis Esperanto-retkursojn al nova nivelo de profesieco. Ĝi ankaŭ montras la kreskantan kunlaboron inter Esperanto-instruistoj. Ĉimaniere homoj povas, anstataŭ verki kurson de la komenco, uzi la jam faritan laboron kaj plibonigi ĝin per sia kontribuo. Tiel la estontaj kursverkantoj havos eĉ pli bonan bazon por komenci, kaj la kvalito kreskos.

Lernu! estas plurlingva kursoje kiu celas helpi al retemuloj lerni Esperanton en facila kaj senpaga maniero. Ni planas al ĝi aldoni iom post iom pli da kursoj kaj subteniloj, klarigas Hokan Lundberg, la teknika prizorganto de la retkurso, kaj aldonas: Ni volis enhave resti tre proksime al la reala Esperanto-mondo kaj pro tio tre atentis pri interaktiva kurso, uzo de kutima ĉiutaga lingvaĵo, konsciigo pri E-aranĝoj kaj muziko, literaturo, filmetoj. La kursanoj ne sentu lernadon kiel ion sekan – ili ekde la komenco sentu ke Esperanto estas bunte aplikata kaj vivanta lingvo. Pro tio ĉe nia retejo ekzistas ankaŭ reta vortaro kaj *tujmesaĝilo*, do la kursanoj povas tuj babilu inter si aŭ kun lingvohelpantoj, diras Sonja Petrović, respondeca pri la didaktiko. *Lernu!* laŭ si estas ankaŭ iuspeca eksperimento pri metodiko de perreta, seninstruista kaj senklasa lingvolemado.

Ĉimomente *lernu!* ekzistas en 18 lingvaj versioj kun ĉirkaŭ 1 350 registritaj lernantoj en pli ol 40 landoj, sed tiuj ciferoj konstante kreskas. La lingvonivelo de la uzantoj tre varias. Intersa cifero estas ke preskaŭ 40% de la registritaj lernas laŭ la anglalingva versio, tamen jam 35% rekte per Esperanto, dum ekzemple nur unu persono uzas la laste aldonitan slovakon version.

Lernu! ofertas tri diversajn kursojn. Momente nur ĉirkaŭ 12% de la kursanoj, kiuj komencis iun kurson, faris ĝin ĝis la fino, sed ni laboras por altigi tiun ciferon per altigo de motiviĝo kaj subteno al lernantoj, diras Petrović kaj malkaŝas alian



Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garanti la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la novembra numero.

Julio



19 - 26: Internacia Junulara Kongreso en Lejĵofors. Temo: *Al libera kulturo*. ☒ TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-2015 BJ Rotterdam, Nederlando. ☎ +31-10-4361044, ☐ oficejo@tejo.org

19 - 26: Esperanto@Interreto: "Rete Lerni" en Boston, Massachusetts, Usono. ☐ msochuck@yahoo.com

19 - 26: IKUEZ-tendaro en Sebrance, Ĉeĥio. ☐ mSPACE@iol.cz

20 - 24: 38-a Brazila Kongreso de Esperanto en Belo Horizonte/MG, Brazilo. ☒ Societo Esperantista de Minas Gerais (SEM), Guajajaras, 410, sala 810 - Centro - BR-30180-100 Belo Horizonte MG. ☎ +55-31-32125533, ☐ smbh@yahoo.com.br

20 - 25: Esperantologia Fakultato: unua sesio en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. ☎ +41-32-9267407, ☐ kce.esperanto@post.club-internet.fr

22 - 26: Inicado al Esperanto, praktikado de la lingvo, 2-a nivelo. ☒ Kvinpetalo, Esperanto-Centro, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎ +33-(0)549428074, ☐ kvinpetalo@club-internet.fr

24 jul - 02 aŭg: 35-a Internacia Infana Kongreseto en Lerum (18 km de Götterburg), Svedio. ☒ Stefan MacGill, Pannónia u. 30/16, HU-1136 Budapest, Hungario. ☎ +36-1-3495207, ☐ stefan.macgill@galamb.ne



26 jul - 02 aŭg: 88-a Universala Kongreso de E-o en Götterburg. ☒ UEA (v. kolofono), ☐ kongreso@co.uea.org

27 jul - 01 aŭg: 6-a Plurnivela Esperanto-Kursaro en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 20 jul).

27 jul - 9 aŭg: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. ☒ Klubo de Esperanto, CZ-674 01 Třebíč, Ĉeĥio. ☎ +420-568-841909, +420-568-851196, ☐ podhradka@volny.cz

31 jul - 2 aŭg: 2003 Supreniro al Damavand

(5645 m), la plej alta irana monto, kun aparta E-programo. ☎ 091 320 177 25, ☐ info@sabzandishan.com

Augusto

01 - 04: Memzorga Lagumado en Délegyháza, Hungario. ☒ László Garamvölgyi, Arany János út 47, HU-1221 Budapest, Hungario. ☎ +36-30-2097864. En Germanio: Andi: +49-511-7000011, ☐ mela-krokodilo@gmx.net

01 - 10: Somera Mezeŭropa Renkontiĝo en Essen-Calhorn, 50 kilometrojn norde de Osnabrück. ☒ Lu Wunsch-Rolshoven, Wicléfstr. 9, DE-10551 Berlin, Germanio. ☎ +49-30-685 58 31, ☐ lu@esperantoland.org; www.EsperantoLand.org/somere

02 - 03: Simpozio pri Interkultura Komuniko en Universitato de Götterburg kun subteno de Sveda Akademio. ☒ Christer Kiselman, Upsala Universitato, Matematika Instituto, Postkasto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio. ☎ +46-18-300708, ☐ +46-78-870708, ☐ +46 18 4713201, ☐ kiselman@math.uu.se

02 - 06: Trejnseminario por instruistoj en Örestrand, Svedio. ☒ ILEI - Interkultura teamo.

Ūlei

02 - 07: 36-a ŪLEI-Konferenco en Örestrand, Svedio. ☒ Boomee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio. ☐ bomee.kimlindblom@swipnet.se

02 - 10: 26-a SEFT en Germanio, meklenburgia lagaro, tendejo "Campingplatz am Dreetzsee". ☐ werner.pfenmig@t-online.de, www.esperanto-nb.de

04 - 10: Internacia Junulara Semajno en Győr, Hungario. ☒ Hungara E-Junularo, p.k. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. ☐ hej@essperanto.hu

04 - 12: OKSEJT-43 en bela naturo de Kostroma regiono, Rusio. ☒ Vitalik Malenko ☐ malenko@inbox.ru aŭ Slavik Ivanov, ☐ slavik@babel.komputilo.org

08 - 14: Magio kaj magiado en la praktiko! Somera Esperanta Zono de Ago-plena Magio (SEZAM-2) apud Volgograd, Rusio. ☒ Eduard Kolosov, ☐ stelaro@volg.ru aŭ edyaa@yandex.ru

09 - 14: Ĉebalta Folkloro Festivalo en Riga kaj Jurmala, Latvio. ☒ Klubo "Verda Ondo", Mara Timermane, Kr. Valdemara 145/1-32, LV-1013 Riga, Latvio. ☎ +371-7-361395, ☐ +371-9-115413, ☐ mtimermane@hotmail.com. Internaciajn vojaĝojn organizas Internacia Klubo "Esperantotur" el Bydgoszcz, Pollando.

09 - 15: 43-a Esperanto-Somerlernejo en Barlaston, Britio. ☒ Derek Tattou, Wedgwood Memorial College, Stadion Road, Barlaston, Stoke-on-trent, ST12 9DG, Britio. ☎ +44-(0)1782-372105, +44-(0)1782-373427, ☐ +44-(0)1782-372393, ☐ wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

10 - 16: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov – Libertempo dum unu semajno sen instruado. ☒ Klubo de Esperanto (v. 27 jul).

10 - 18: Memzorga Lagumado (granda MELA) en Délegyháza, Hungario. ☒ László Garamvölgyi (v. 1 aŭg).

12 - 16: Pri muziko kaj Praktikado de la lingvo kun Anne-Sophie en Bouresse. ☒ Kvinpetalo (v. 22 jul).

14 - 24: Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-03) apud urbo Kovrov (250 km de Moskvo), Rusio. Temo: "Homoj: konataj kaj nekonataj". ☒ Rusia E-Unio, ☐ nikolao@yandex.ru aŭ garik@mitino.ptt.ru

15 - 18: Tri ĉinaj kongresoj: La 5-a Ĉina Kongreso de Esperanto; La 22-a Komuna Seminario de Ĉinaj, Japanaj kaj Koreaj Junuloj; La 1-a Internacia Esperanto-Turisma Festivalo de Ĉinio. Yanji, Jilin-Provinco, Instruista Universitato Yanbian. Post la kongresoj (18-20 aŭg) ekskursoj. ☒ Li Jundao, 51-2-11 xinhua str. Yanji, Jilin prov., Ĉinio. ☎ 86 433 2911980, ☐ 86 433 2663360, ☐ jundao21@yahoo.com.cn; bakgiwan@yahoo.co.kr

15 - 29: Afrika vojaĝo de Varsovio al Kinŝasa – Kongo – Brazavilo kaj reen. ☒ Afrika Turismo/ Kongotur Filio en Pollando, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. ☎ +48-607-437778, ☐ afrikaturismo@yahoo.fr aŭ esperantotur@yahoo.fr

16 - 23: 7-aj Bretonaj Renkontiĝoj de Plouezec. ☒ Louise Rigault, 4 route de Kervor, FR-22470 Plouezec, Francio. ☎ +33-296227013, ☐ andrigault@wanadoo.fr; www.plouezec.fr/esperanto.html

16 - 24: Suda Bordo de Krimeo: turista marŝo. ☒ Miĥaĉo Ĵdanov, ul. Sverdlova 83, kv. 44, UA-98603 Jalta, Krimeo, Ukrainio. ☎ +38-0654-378189, ☐ volodimir_h@ukr.net

17 - 30: Internacia Esperanto-Renkontiĝo en Kinŝasa – Kisantu – Mbanza – Ngungu – Lukala – Matadi – Boma – Muanda en Respubliko Demokratia Kongo. ☒ Afrika Turismo "Esperantotur", ☐ Vizitu_rdc2003@yahoo.fr aŭ esperanto@yahoo.fr

19 - 23: Preparado al altaj studoj, skriba kaj parola partoj kun Janine Dumoulin, Georges Lagrange en Bouresse. ☒ Kvinpetalo (v. 22 jul).

19 - 26: FESTO en Paimpol ĉe Atlantika Oceano, Francio. ☒ Junulara Esperantista Franca Organizo, Bertrand Hugon, ☐ BFHugon@esperanto.org aŭ cpoulet@oreka.com

21: Renkontiĝo de Taguatinga apud Braziljo, ĉefurbo de Brazilo. ☐ tek.esperanto@terra.com.br

23- 7-a Internacia Esperanta Tablotenis-konkurso. ☒ Katalin Farago, pk. 89, HU-6801 Hódmezővásárhely, Hungario. ☒ konyv@korhaz.hodtav.hu



23 - 30: Neformala renkontiĝo en Grésillon. ☒ Chateau, FR-49150 Baugé, Francio. ☎ +33-2-41891034, ☒ esperanto.en.wendomois@mail.dotcom.fr

23 - 30: FESTO 2003 en Paimpol (Plouézec), Bretonio. ☒ Cyrille Pouillet, 103 av. Verdier, FR-92120 Montrouge, Francio. ☎ +33 1 46 56 89 59, +33 6 77 28 13 25. ☒ cpouillet@oreka.com

23 - 31: 29-a Internacia Esperanto-Semajno en Sète ĉe Mediteraneo. Trinivela kursejo en agrabla feriejo kun banado, ripozo, turismo. ☒ Esperanto Culture et Progrès, 5 rue Docteur Roux, FR-34090 Montpellier, Francio. ☎ +33-0467541543, ☒ yuierme@netcourrier.com aŭ nikolao.k@wanadoo.fr

24: Hoverlano en Karpatoj. ☒ Jaroslav Zaharija, B. Hmelnickij ul., 82/4-8, UA-76006 Ivano-Frankivskij, Ukrainio.

25 - 31: Kafoklaĉa Internacia Somera Renkontiĝo (KISO) Marburg. ☒ Marburga Esperanto-Grupo (MEG), Afföllerstr. 19, DE-35039 Marburg/Lahn, Germanio. ☒ kiso@esperanto.de

27 - 31: 71-a Itala Kongreso de Esperanto. Ancona-Portonovo. ☒ Gruppo Esperantista Marchigiano "La Verda Pego", Casella Postale 521, Ancona, Italio. ☒ menghini.marco@libero.it

27 aŭg - 02 sep: 21-a Ĉina Tempa Foiro de Jiuhua monto, Sanktejo de Budhismo, kun E-o kiel pontolingvo. ☒ Liu Jianguo, direktoro de Hefei verdstelo Esplora Instituto pri Turismo, Langyasan Lu, Changhuai Xincun, B-Qu 3-105#, CN-230011 Hefei, Ĉinio. ☎ +86-551-4484370, ☎ +86-551-4210414, ☒ yjs@mail.hf.ah.cn

30 aŭg - 06 sep: 16-a Ekumena Kongreso (56-a de IKUE kaj 53-a de KELJ) en Rimini, Italio. ☒ Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. ☒ b.eichkorn@t-online.de



30 aŭg - 06 sep: 26-a Sanmarina Universitata Sesio en Rimini, Italio. ☒ Adoc. Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschildweg 6/317, DE-37077 Göttingen, Germanio. ☒ blewo1@hrz.uni-paderborn.de

31 aŭg - 07 sep: Eŭropa renkontiĝo por lernantoj el mez- kaj altlernejo en Kostrena. Temo: Arkitektura heredaĵo. ☒ Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ☎ +385-1-4617550, ☎ +385-1-4619373, ☒ esperanto@zg.tel.hr

septembro

01 - 07: Bretona Bubado en Monteneuf, Bretonio. ☒ 15 Woodbridge Close, Luton, GB-LU4 9DB, Britio. ☒ Venu@BretonaBubado.org

04 - 08: BARO 2003 (Berlina Arbara Renkontiĝo) en Bad Münder apud Hannover, Germanio. ☒ comny.temstaedt@epost.de

05 - 07: 95 jarojn de Esperanto en urbo Rostock. ☒ magretS@web.de

05 - 07: Nordokcidenta Regiona Esperanto-Konferenco de Nordameriko (NOREK) en Sidney, Brita Kolumbio, Kanado. ☒ Wally G. du Temple, 765 Braemar Av., North Saanich BC, V8L 5G5, Kanado. ☒ iwoleskatt@aol.com

05 - 12: Instruado kaj vivo de Andreo Cseh kun provlecionoj de la Ce-kurso kun Ed Borsboom. ☒ Kvinpetalo (v. 22 jul).

6 - 7: Someraj Dialogoj en Esperanto-Restadejo: prelegoj kaj Esperanto-kurso, turismo. ☒ Salvador Aragoj, Camí del Pou n-ro 9, ES-08691 Monistrol de Monserrat, Hispanio. ☎ +34-933-338081.

12 - 19: Instruado kaj Vivo de Andreo Cseh kun provlecionoj de la kurso kun Ed Borsboom en Bouresse. Piedmigrado kun Monique Dussenty, Thérèse Pinet. ☒ Kvinpetalo (v. 22 jul).

13 - 14: Aŭtunaj Tagoj en Raŭimo. ☒ E-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. ☒ ea@esperanto.fi

14: 1-a Spiritista E-Renkontiĝo. ☒ E-lernejo Yvonne Pereira, Av. Nova York 686, Porto Alegre, RS, Brazilo.

23 - 26: 5-a Forumo de Junaj Sciencistoj kaj Studentoj de Azi-Pacifika Regiono en Rusio, Vladivostok. ☒ Aleksandr Titajev, ☒ oriento@mail.ru.

25 - 28: 14-a Montkabana Renkontiĝo: aranĝo por montmigruloj kaj naturamiko en Tuk apud Mrkopalj, Kroatio. ☒ Vanja Radovanovic, Horvaĉanska 31, HR-10 000 Zagreb, Kroatio. ☎ +385-1-913654626, ☒ vanja.radovanovic@etk.ericsson.se.

25 - 28: 29-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kaj 24-a Studadesio de AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB). ☒ Internacia Klubo "Esperantotur", ul. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. ☎ +48-52-3461151, ☒ turismo@bydg.pdi.net.

26 - 28: XIX-a Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES en Poznań. ☒ Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2/7, PL-61-002 Poznań, Pollando. ☎ +48-61-8755879; +48-602-283242. ☒ janowczyk@pawel.poczta.onet.pl

26 - 28: 16-a Internacia Kultura Festivalo: Ŭstí nad Labem, Ĉeĥio. ☒ Miroslav Smyčka, Kojetická 90, CZ 400 03 Ŭstí nad Labem. ☒ j_kriz@volny.cz

oktobro

Semajnaj Esperanto-Kursoj pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, Pollando (de oktobro ĝis decembro). ☒ Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, ul. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. ☎ +48-52-3461151, ☒ turismo@bydg.pdi.net

01 - 02: 4-a Hefei-konkurso pri drakboatado kun E-o kiel pontolingvo en Hefei, Ĉinio. ☒ Liu Jianguo (v. 27 aŭg).

02 - 05: KoKoLoRES Kafoklaĉo kaj ludosemajnfino en Herne. Samtempe okazos Esperanto-kurso por komencantoj. ☒ Petra Dückershoff, ☒ petra.dueckershoff@web.de

03 - 05: 5-a Korea Kongreso de Esperanto en Ĉonan. ☒ keast@soback.kornet.net aŭ esperant@intel.co.kr

03 - 30: 19-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo en Pekino - Xi'an - Tibeto - Ĉengdu - Ĉongŝuing - Jangce Rivero - Wuhan - Hefei - Ŝanhajo - Hongkongo (kun 4 vojaĵvariantoj) en Ĉinio. ☒ Internacia Klubo "Esperantotur" (v. 25 sep).

04 - 11: Internacia E-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Santa Susanna (apud Barcelono), Hispanio, en moderna hotelo apud plaĝo. Prelegoj, ekskursoj, amuzajtoj. ☒ Santiago Torné, Apartat 423, ES-08200 Sabadell, Hispanio. ☎ +34-937253421, ☎ +34-937314111, ☒ luis_serrano@mixmail.com

04 - 14: 3-a Taĝika Tutlanda Kongreso en Taĝika Stata Universitato en Duŝanbe. ☒ Sukurov Firdaus, Glavpŝtamat, a.k. 135, TJ-734000 Duŝanbe, Taĝikistano. ☎ +992-372-273 761, ☎ +992-372-216357, ☒ aitcon@cada.tajik.net; hirdaus@espero.tajik.net, www.traveltajikistan.com/homepages/firdaus/

11 - 13: 90-a Japana Esperanto-Kongreso en Kameoka apud Kioto, Japanio. ☒ Japana Esperanto-Instituto (JEI), Konstanta Kongresa Komitato de la Japana Esperanto-Kongreso (KKK) kaj Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA).

11 - 18: Krozado sur Rejno per la ŝipo Brillant inter Bonn kaj Mannheim. Transporto inter Arnheim kaj Bonn per aŭtobuso. ☒ Fondaĵo Libertempo, Rothenbachpark 44, NL-6063 NM Vlodrop, Nederlando

16 - 19: Jarfina kaj Zamenhofa Festo (JAZAF) kun klerigaj kaj turistikaj tagoj: tradicia aranĝo en Saksio inter Leipzig kaj Dresden, en vilaĝo Dorf Wehlen en Saksia Svisio, proksime de Pirna. Klerigaj posttagsejoj kun Stano Marček. ☒ Norbert Karbe, Dr.-Otto-Nuschke-Str. 12, DE-01796 Pirna. ☎ +48-03501 773232, ☒ NoKoSaksio@tiscali.de

17 - 19: 26-a BAVELO-Seminaro kune kun Esperanto France-Est kaj IKUE en Oberkirch (rande de la Nigra Arbaro). ☒ D-ro Ursula Niesert, ☒ GEA@esperanto.de

17 - 19: 40-a Faulhaber Semajnfino en la feriejo "Mennorode" en Elspeet. ☒ Esperanto Nederland, Arubastraat 12, NL-9715 RW Groningen, Nederlando. ☒ info@esperanto-info.nl

17 - 19: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Litomyšl. ☒ Petro Ĉrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio. ☎ 252 712 201, ☎ 420 257 712 126, ☒ chrdle@kava-pech.cz; www.kava-pech.cz

24 - 26: 38-a Semajnfina Esperanto-Seminaro en Neubrandenburg, Germanio. ☒ werner.pfennig@t-online.de

24 - 26: Postsomera Klackunveno en Namur, suda Belgio. ☒ Flandra Esperanto-Junularo, Yves Nevelsteen, Rabotstraat 55, BE-9000 Gent, Belgio. ☎ +32-9-3307156, ☒ yes@esperanto.be

24 - 31: Praktikado de la lingvo en Bouresse. ☒ Kvinpetalo (v.22 jul).

25 - 26: Kultura Monatfina ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 20 jul).



25 okt - 12 nov: Flugkaravano por eŭropaj piediremluloj al Koreio, Japanio kaj Tajvano. ☒ Petro Ĉrdle (v. 17 okt).

31 okt - 02 nov: 3-a Kongreso de 3 Kalifornioj, AIS-RSM-Meksikio. 3-ĝrada kurso. ☎ +52-686-5564902 (Ruben Feldman-Gonzalez).

31 okt - 02 nov: Seminario pri Esperanto-Literaturo en Den Haag, Nederlando. ☒ Internacia Esperanto-Instituto (IEI), Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. ☎ +31-70-3556677, ☎ +31-70-3584422, ☒ iei001@tiscali.nl

novembro

01 - 02: 14-a Kongreso de UĤREA, Kijiv. ☒ Volodimir Ĥordijenko, p.k.35, UA-01133 Kijiv, Ukrainio. ☒ volodimir_h@ukr.net

01 - 02: 15-a Nordfranca Eŭropa Esperanto-Rendevuo en Morbecque-le-Parc, Francio.

06 - 13: Vizito en Kamerunio. ☒ Monda Turismo Kamerunio, S-ro Jean Marie Mboge Mbele, B.P. 1816, Douala, Kamerunio. ☎ +237.427703

08 - 11: 7-a Glivicea Renkontiĝo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto (GRUPE) en Glivice. ☒ Pola Esperanto-Asocio, Skr. poczt. 21, PL-44-101 Glivice, Pollando. ☎ +48-32-2316507, +48-32-2326035, ☒ stanislaw.mandrak@esperanto.pl

13 - 19: 20-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo en Buenos Aires, Argentino. ☒ Internacia Klubo "Esperantotur" (v. 25 sep).

22 - 23: Studsemajnfino en naturamikdomo August Reitsmahuis en Hoek van Holland. Plurnivela lernado de Esperanto. ☒ Jeannette Bosse, Veldm. Montgomerijlaan 361, NL-5612 BH Eindhoven, Nederlando. ☎ 040-211 33 44, ☒ hj.bosse@wxs.nl

24 - 30: Internacia paroliga semajno en Dobřichovice, Ĉeĥio (gvidas Stano Marček). ☒ Petro Ĉrdle (v. 17 okt).

28 - 30: Paroliga kurso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun la Esperanto-Ekzamenoj (komune kun la Internacia paroliga semajno). ☒ melicharkova@quick.cz

29: V-a landa Zamenhof-festo en Meklenburgo-Pomerio, Germanio, urbo Neubrandenburg. ☒ werner.pfennig@t-online.de

29 - 30: Kultura Monatfina ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista (V. 20 jul).

decembro

06: Varba manifestacio de esperantistoj lige al la Pinta Kunveno de ŝtat-estroj de UN. ☒ mirville.grosjean@rpm.ch

06: 23-a Ĉeĥa Saksia tago en Ŭstí nad Labem, Ĉeĥio (prelegoj, kultura programo, ekskurso). ☒ j_kriz@volny.cz; m.smycka@seznam.cz

06 - 10: Zamenhofa semajno: Zamenhof kaj medicino kun Jean-Luc Tortal en Bouresse. ☒ Kvinpetalo (v. 22 jul).

10 - 15: Zamenhofa semajno en Bouresse. ☒ Kvinpetalo (v. 22 jul).

12 - 14: 57-a Kultura Semajnfino en Homburg (Saar), Germanio. Lingvo-kurso, fakaj prelegoj kaj ekskursoj. ☒ sel_esperanto@comundo.de

13 - 14: Zamenhofaj tagoj. ☒ Tatjana Auderskaja, ul. Korolenko 5b-26, UA-65100 Odessa, Ukrainio. ☒ zoo@te.net.ua

14 - 15: 5-a Tutlanda kongreso de Tanzania Esperanto-Asocio en la urbo Mwanza ĉe la lago Viktorio, Tanzanio. ☒ masho@yahoo.com

15: Tago de Esperanta Libro. Ĉetu, pruntu en biblioteko, aŭ simple prunu el via librobreto – kaj legu E-libron!

27 dec - 03 jan: Jubilea 20-a Internacia Festivalo (aranĝo por familioj kaj personoj 25 - 55 jaraĝaj) en nordgermana Kiel. Kadra temo: "Rusio". ☒ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎ +49-5624-8007, ☎ +49-171-4964558. ☒ HDP@internacia-festivalo.de

27 dec - 03 jan: 47-a Internacia Seminario

Kalendaro por la jaro 2004

januaro

02 - 14: Zamenhofologiaj Tagoj pri Lidja Zamenhof kun prelegoj de gravaj zamenhofologoj en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 20 jul).

04 - 07: Kristnaska birdokalkulo en Odeso, Ukrainio. ☒ Tatjana Auderskaja (v. 13 dec).

februaro

21 - 27: REK-EoLA, 23-a Rusia Esperantista Kongreso kaj 16-a festivalo EoLA en Volgograd. ☒ garik@mitino.ptt.ru

25 - 29: ADORU – la ekumena preĝ- kaj kant-libro. Kantoj kaj Diservo, diskutoj pri la libro kaj pri Esperanto, en Strasbourg. ☒ Bernhard.Eichkorn@esperanto.de



marto

21 - 27: 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto en Hamerica, Kubo. ☒ Kuba Esperanto-Asocio, poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo. ☎ +53 (7)404484 kaj 53-9102, ☎ 33-8729, ☒ kubesp@ip.etecsa.cu

aprilo

10 - 12: 59-a SAT-Amikara Kongreso en La Roche-sur-Yon (departemento Vendée). ☒ Laborista Esperanto-Asocio, 67 Avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio.

majo

07 - 15: 56-a IFEF-kongreso en Sopron. ☒ Magyar Vasutás Egyesület, Andrásy út 73-75, HU-1062 Budapest, Hungario. ☒ ikf56@freemail.hu



15 - 18: IFEF-Postkongreso en Székesfehérvár Hungario. ☒ Magyar Vasutás Egyesület, HU-1062 Budapest, Andrásy út 73-75, Hungario. ☒ ikf56@freemail.hu



(junulara aranĝo) en Naumburg, Germanio. ☒ Martin Sawitzki, Max-Plack-Ring 8d / L 56, DE-98693 Ilmenau, Germanio. ☎ +49-3677-786033, ☒ is.admin@esperanto.de

28 dec - 02 jan: 2-a Novjara Renkontiĝo en Tecklenburg apud Münster, Germanio. ☒ Lu Wunsch-Rolshoven (v. 1 aŭg).

31 dec - 01 jan: Novjarfesto en Jarpatoj. ☒ Jaroslav Zaharija, B. Hmelnickij str, 82/4-8, UA-76006 Ivano-Frankivskij, Ukrainio.

31 dec - 01 jan: Silvestro en Ĉaŭdefono. Svislando. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 20 jul).

28 - 31: 81-a Germana Esperanto-Kongreso en Neubrandenburg (Meklenburgo-Antaŭpomerio). ☒ Germana Esperanto-Asocio, Immenthalstr. 3, DE-79104 Freiburg, Germanio. ☎ +49-761-289299.

julio

10: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. ☒ bajai@eposta.hu



17 - 23: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK – Esperanta gazetaró, Pécs, Hungario. ☒ Orbis Pictus de Viŝnja Branković, Via Parini 5, IT-34 129 Trieste, Italio. ☎ +39-040-767875, ☒ orbispictus@iol.it

18 - 22: 39. Brazila Kongreso de Esperanto en Maceio. Inf: AAE, C.P. 396, BR-57020-970 Maceió/AL. ☎ (02182) 324-2979, ☒ ariknubxxi@ig.com.br

10 - 17: 60-a IJK en ripozejo Berjozka apud Kovrov (regiono Vladimir), Rusio. ☒ TEJO, <http://www.tejo.org/vikio/ijik-2004>

24-31: 88-a UK en Pekino, Ĉinio. ☒ UEA, http://www.uea.org/esperanto/index_kongres.html

aŭgusto

25 - 29: 6-a Esperanta Eŭropa-Unia Kongreso (EEU-Kongreso) en Bilbao (Vaskio-Hispanio). ☒ esperantobilbao@terra.com; www.geocities.com/esperantobilbao.

Regule aktualigata listo de E-aranĝoj konsultblas ĉe: www.esperanto.hu/kalendar.htm. Por rete ricevi la tekstan version, bonvolu sendi (malplenan) retmesaĝon al aŭtomato: kalendaro@esperanto.org.

La lingva interplekto eŭropa II.

Claude Piron

La titolo de ĉi tiu artikolo elvokas Eŭropon. Mi tuj precizigu, ke, kiam mi diras Eŭropo, mi ne limigas min je Eŭropa Unio. Mi celas la tuton de nia mondoparto, kie la lingva diverseco estigas multajn problemojn.

Kompari kompareblan

Mi nun transiras al la rolo de la ŝtatoj. Miaopinie, ili evitas preni sur sin siajn respondecojn en la kampo lingva. La lingva diverseco estas riĉaĵo, kiun oni konservu. Sed ĝi estigas en la praktika vivo komplikajn, je kiuj indus senigi sin. Oni do serĉu solvon, kiu respektu tiujn du konfliktajn indojn. Sed respondo oni ne trovas, se oni ne starigas la demandon. Nu, neniu ŝtato kuraĝas vortigi la demandon: *Kio estas laŭ ĉies intereso en la kampo de lingva komunikado? Kaj eĉ malpli ili kuraĝas objektivaj esplori, kio eblas.*

Por koni realaĵon, necesas kompari. Vi ne konas longecon, se vi ne komparas la mezurendan objekton al difinita mezuro, ekzemple metro. En agronomia esploro, oni semas la novan semon sur duono de terpeco kaj la malnovan sur la alia duono. Oni scias, ke la tero estas simila ambaŭflanke, ke la du terpecoj submetiĝis al samaj meteorologiaj kondiĉoj. Se do la rikolto estas pli bona en unu duono, oni scias, kiu semo havigis la pli bonan rendimento. Post kiam oni ellaboris novan kuracilon, oni ĝin ne surmerkatis sen unue plenumi t. n. klinikajn provojn, kio signifas, ke oni komparas ĝin al medikamento kun konata efiko aŭ al inerta substanco (placebo). Kaj kiam oni intencas efektiviĝi grandajn konstrulaborojn, oni elsendas alvokon por ofertoj, kun la celo ricevi plurajn projektojn kaj kompari ilin unuj al la aliaj.

Se konsideri, ke tio estas la normala praktiko en ĉiaspecaj kampoj, estas nekredible, ke neniu ŝtato diris: *Ni investas riĉegojn en la instruadon de la angla, kiel, cetere, en tradukadon kaj interpretadon. Por scii, ĉu tio estas la famaniero, kiu plej bone akordas kun la interesoj de nia loĝantaro, ni komparu ĝin al rivalaj sistemoj.*

Eble mi eraras, sed mi opinias, ke mi estas la sola, kiu komparis en la faktoj la diversajn lingvajn aranĝojn uzatajn en altnivelaj interŝanĝoj, kaj kiu publikigis la rezultojn. Mi diras *altnivela*, ĉar sur elementa nivelo kompari tre malfacilas. Mi ne inkluzivigis en mian esploron gestan komunikadon aŭ la balbutadon de nebone regata lingvo, kiuj ofte estas la solaj rimedoj disponeblaj al ordinaraj homoj. Mi konsideris nur la sistemojn aplikatajn sur intelekto altaj niveloj, kiel ĉe negocaj aŭ interŝtataj traktadoj, politika asembleo, fakula kongreso, internacia laborgrupo k.s. Tianivele ekzistas en la mondo nur kvin sistemoj. Laŭ tutmonda uz-ofteco ili estas:

1) la kelklingva sistemo: oni uzas nur kelkajn lingvojn, kun tradukado skriba kaj buŝa; tiu estas la sistemo uzata en UN kaj en la organizoj ligitaj al ĝi, same kiel en multegaj internaciaj kongresoj;

2) la unulingva sistemo: tiu estas uzata de multaj multnaciaj



kompanioj kaj de granda nombro da internaciaj kunsidoj: oni uzas nur unu lingvon, ĝenerale la anglan;

3) la ĉiulingva sistemo, uzata de Eŭropa Unio: ĉiuj lingvoj de partoprenantoj estas akceptitaj, kun buŝa kaj skriba tradukado;

4) la neŭtrallingva sistemo: oni uzas nur unu lingvon, sed ĝi ne estas la lingvo de iu popolo: latina, Esperanto; kaj

5) la t.n. svisa aŭ skandinava sistemo: ĉiu uzas la propran lingvon, sed ne okazas tradukado, ĉar ĉiuj partoprenantoj komprenas ĉies lingvojn. Tiu estas la sistemo uzata en la aviada kompanio SAS; ĝi estas ofta ankaŭ en Svislando, notinde en la Parlamento, kie, en komisiaj kunsidoj, ĉiu parolas germane, france aŭ itale, kaj ĉiu estas supozata kompreni la tri lingvojn.

Tiu kvina sistemo ne estos konsiderata ĉi tie, ĉar ĝi ne estas vere aplikebla, se oni uzas pli ol tri lingvojn, kaj ankaŭ ĉar ĝi neprigas kulturen etoson kaj instrusistemon, kiuj estas esceptaj en la mondo.

La kvar aliajn sistemojn mi komparis laŭ tuta serio da kriterioj. La rezultoj aperas en la ĉi-sekva tabelo. Notu, ke ĝi registras nur, ĉu malavantaĝo ekzistas (1) aŭ ĉu ĝi forestas (0) en la koncerna lingvosistemo. Estis la sola maniero povi uzi fidindajn donitaĵojn.

Sistemo:

	kelklingva	unulingva	ĉiulingva	neŭtrallingva
a) antaŭa individua lernado	1	1	0	1
b) antaŭa publika investado (lingvoinstruado)	1	1	0	1
c) institucia investado (lingvaj servoj)	1	0	1	0
d) neegaleco kaj diskriminado	1	1	0	0
e) lingva kosto de kunsido	1	0	1	0
f) kosto de dokumentproduktado	1	0	1	0
g) tempo necesa por ricevi dokumenton	1	0	1	0
h) informperdo kaj informfuŝo	1	1	1	0
i) graveco de lingva handikapo dum kunsido	1	1	0	1
j) graveco de lega lingva handikapo	1	1	0	1
k) limigoj kaj malfacilaĵoj	1	1	1	0
l) limigoj kaj malfacilaĵoj (ekzemple neceso disponi interpretbudojn, devo uzi aŭskultilojn)	1	0	1	0
m) probabla kresko de la komplik-ajoj en la venontaj dudek jaroj	1	0	1	0

Nombro de la malavantaĝoj 12 7 7 4

La plej efika sistemo

Vi komprenas, kial mi diras, ke la ŝtatoj ne prenas serioze siajn respondecojn. Estas klare, ke Esperanto havigas la plej bonan sistemon, aŭ, se vi preferas, la malplej fuŝan. Tamen mia kalkulado estas aparte maljusta al ĝi. Ekzemple la unua punkto, *antaŭa individua lernado*, traktas egale ĉiujn aranĝojn, en kiuj almenaŭ parto de la partoprenantoj devis antaŭe lerni fremdan lingvon. Ĝi ne prenas en konsideron la fakton, ke, mezume, ĉe sama nombro da semajnaj horoj, ses monatoj da Esperanto havigas komunikkapablon, kiun oni atingas nur post ses jaroj ĉe alia lingvo. Simile pri kriterio *l graveco de lingva handikapo ĉe kunsido*: ĝi preterlasas la fakton, ke Esperanto estas, por ĉiuj, pli facile prononcebla ol lingvo kiel la angla, kaj, aŭde, konsiderinde pli klara, kaj sekve pli komprenebla.

Se konsideri la fakton, facile kontroleblan, ke el ĉiuj rimedoj uzataj de homoj por superi la lingvobariĝon Esperanto estas tiu, kiu havigas la plej bonan efikecon rilate al la kosto kaj la plej bonan fluecon rilate al la lernodaŭro, estas neallasinde, ke la registaro agas, kvazaŭ ĝi ne ekzistus. Se almenaŭ ili dirus: *Ni objektivaj studis la demandon, ni komparis Esperanton, kiel komunikilon inter homoj el diversaj landoj, al la aliaj sistemoj uzataj, kaj ni konkludis el tiu esploro, ke Esperanto estas malsupera al la rivalaj metodoj laŭ tiu, tiu kaj tiu alia vidpunktoj*, estus akceptebla. Sed neniu registaro esploris la aferon. Oni forĵetas Esperanton, aŭ, pli ĝuste, rifuzas starigi la demandon, al kiu ĝi eble kontentige respondas, ĉiam nur apriorie. Oni akuzas Esperanton, ke ĝi estas idiota, aŭ fantazia, aŭ neserioza, kaj oni kondamnas ĝin resti ekster la intercivitana vivo. Sed ĉu estas normale akuzi kaj kondamni antaŭ ol enketi, kolekti informojn, studi la faktojn kaj alveni al iu grado de certeco? Tiu maniero agi egalas la eliminadon de studento fare de juĝantaro, kiu ne interesiĝis pri liaj studoj, ne legis liajn verkaĵojn, kaj ne rigardis, kiajn poentojn li ricevis ĉe la diversaj ekzamenoj. Pretendi konstrui Eŭropon surbaze de sinteno tiel kontraŭdemokratia, tiagrade kontraŭa al la principoj de objektiveco kaj faktokontrolo ĉiam aplikataj en juro kaj scienco, tre malbone aŭguras pri la onta evoluo de nia mondoparto.

Malmultekosta medikamento

La fakto, ke la ŝtatoj tiel eskapas el siaj respondecoj estas lades malpli pardonebla, ĉar ili ne devas fari multon, ili eĉ, praktike, apenaŭ bezonas elspezi unu groŝon. Multaj karakterizoj de la funkciado de lingva komunikado en la hodiaŭa mondo ebligas asimili al socia malsano la oftegan mankon de reciproka kompreno inter la homoj. Rilate al tiu malsano Esperanto prezentiĝas kiel efika kaj malmultekosta medikamento. Alivorte, la ŝtatoj estas en la situacio de ministro pri publika sano, kiu, fronte al epidemio – fakte, endemio – rifuzas rekomendi al la malsanuloj adekvatan kaj nemultekostan kuracilon, kaj malpermesus, ke liaj funkciuloj entreprenu klinikajn eksperimentojn por difini, kia estas tiu medikamento kompare kun la aliaj metodoj aplikataj por trakti la koncernen malsanon. Estas ne nur malmorale, ne nur masohisme, estas stulte.

Mi diras, ke la ŝtatoj povus helpi solvi la problemon apenaŭ agante, kaj preskaŭ sen elspezi groŝon. Tiu aserto verŝajne aperis al vi nekredible. Mi tamen opinias, ke ĝi spegulas la veron. Kion la ŝtatoj devus fari, tio estas, tute simple, proklami la realon. Ne necesus, ke ili organizu ĝeneraligitan instruadon de Esperanto. Sed ke ili diru al siaj loĝantaroj: *Ni studis la demandon. Esperanto povas solvi la problemojn starigitajn de la lingva diverseco sen kultura aŭ politika malavantaĝo (kontraste kun la angla) post relative mallonga daŭro. Ni do rekomendas al ĉiuj niaj landanoj eklerni Esperanton. Post kelka tempo ili povos komuniki trans la lingvaj baroj per la psikologie plej agrabla*

sistemo el ĉiuj, kiuj nun ekzistas, kaj per la komunikilo, kiu estas plej rapide akirebla. Vi vidus ĉiujn firmaojn, kiuj ofertas lingvokursojn proponi instruon de Esperanto. Radiaj kaj televidaj stacioj prezentus tiajn kursojn, dum kelkaj minutoj ĉiutage. Gepatroj postulus, ke la lernejoj aranĝu Esperanto-instruadon, kaj la lernejoj ĝin havigus kadre de la nedevigaj kromfaktoj, apud judo, fluto kaj la arto *makrami*. Multaj homoj eklernus mem, ĉu per mem-instruaĵo libroj, ĉu per unu aŭ alia el la multaj kursoj haveblaj sur interreto, ĉu en kursoj organizitaj de la lokaj Esperanto-societoj.

Post nelonge, eŭropanoj interkompreniĝus per preciza, humura, riĉa lingvo, kiun uzi estas tre agrable, kaj kiu respektas pli bone ol iu ajn alia la naturan funkciadon de cerbo celanta esprimi sin, kaj ili ĝin akirus sen elspezi pli da nerva energio ol tion, kion multaj investas en la ĉiutage kruvcvorta enigmo. Mi esperas ne ŝoki vin, se mi diras, ke mi renkontis personon, kiu studis Esperanton en la necesejo, dediĉante al ĝi kelkajn minutojn ĉiutage kaj ĉiŭespere, kaj, kiu post kvar monatoj, jam bone esprimis sin. Kaj ne nur eŭropanoj interkompreniĝus, sed ili malkovrus, ke ekzistas homoj en Japanio, Koreio, Mongolio, Ĉinio, Irano, Rusio, Kongo, Brazilo, fakte preskaŭ ĉe ĉiuj, kiuj scipovus la lingvon kaj pretas diskuti kun ili, ĉu rekte, ĉu retmesaĝe. Sincere, ĉu tiel eksterordinara rezulto ne celindus, se konsideri, ke ĝi postulas praktike nenion de la ŝtataj administracioj, krom ege facila kontrolo de la faktoj, sekвата de solena deklaro, sufiĉe ripetata de la amaskomunikiloj, por ke ĝia mesaĝo penetru la mensojn?

Post kiam la lingvoproblemoj malaperos ĉe la ordinaruloj dank' al Esperanto, la altaj funkciuloj de la eŭropaj institucioj finfine konstatos la ŝanĝon kaj demandos sin, ĉu ne indus, ke ankaŭ ili alprenu la solvon, kiun la loĝantaro antaŭ ili aplikis.

Por ke tiu projekto realiĝu, eble necesos atendi, ĝis iu advokato preparos kolektivajn plendon, usonece, por procesi antaŭ tribunalo kontraŭ la registaroj, postulante kompenson de la damaĝo suferita de la landanoj, kiuj perdis grandajn kvantojn da tempo, mono, penoj por akiri la anglan, kun neentuziasmigaj rezultoj, simple ĉar la ŝtatoj rifuzis objektivaj informi ilin pri la ekzisto de sistemo multe pli bona, pli malmultekosta, kaj pli rapide akirebla.

Socia neŭrozo: masohismo

Mi transiris de lingva profesio al psikologia, kaj fariĝis psikoterapiisto. Unu el la konstatoj, kiuj ĉiam impresas min en mia praktiko, estas, ke tio, kio resanigas, estas la realo, aŭ pli ĝuste la fakto akcepti kaj agnoski la realon. Miaopinie, nia socio suferas pro terura neŭrozo, bazita unuflanke sur reciproka malfido kaj aliflanke sur masohismo, kiu kredigas, ke simplaj solvoj malpli valoras ol komplikaj. Kvazaŭ 28-litera alfabeto ne ebligus esprimi pensojn same profundajn kiel skribo enhavanta centojn da miloj da hieroglifoj. Sed tiun socian neŭrozon eblas resanigi kiel individuajn: per alfronto al la realo. Tamen ĉu, kiu praktikas psikoterapon, scias, ke fronti al la realo ofte postulas kuraĝon. Por niaj regantoj, por multaj intelektuloj, Esperanto estas kiel la aĉa, terura krokodilo, kiun kvarjara infano imagas kuŝanta sub la lito. Fakte, ne kuŝas tie krokodilo. Sed por certigi pri tio, vi devus elitiĝi kaj rigardi. Ĉu vi ne riskas troviĝi front-al-fronte kun terura sovaĝa besto, kiu volos vin manĝi? Tial estas pli facile resti en la lito kaj nenion kontroli, kiaj ajn la malavantaĝoj de tiu decido, nekuraĝa, sed tipe homa. Rigardi la faktojn, kompari: jen la kuraĝa faro, kiun la intelekta kaj politika elito de nia mondoparto trovas tiel malfacile realigebla. Ke tiuj homoj, kun sia alta situo en la socio, ne facile prenas sur sin similan riskon, estas kompreneble: ili riskus konstati, ke dum pli ol jarcento ili eraris. Kaj kiu potenculo akceptas vidi siajn erarojn kaj ilin montri al la publiko? Tamen ilia rifuzo alfronti la realon ĉi-kampe estas ege bedaŭrinda por Eŭropo, kiu provas konstruiĝi. Kaj esti demokratia.



Ĝuu rapide, homoj

Vidbendo: *Venu rapide homoj*. Muzika komedio en du aktoj. Tekstoj de M. kaj P. Castellacci k.a. Muziko de M. Pailicelli k.a. El la itala trad. Giuseppe Castelli kaj Pier Luigi Cinquantini. Blera: La Nuova Compagnia, 1998. PAL. Ĉ.120 min. Muzikalo pri la vivo de Sankta Francisko el Asizo. Prezo: € 24,00.

En la jaro 1892 aperis en *La esperantisto* artikolo de la fama rusa E-pioniro N. Borovko: *Teatro esperantista*. Ĝi estis la unua artikolo ĉi-tema, en kiu la aŭtoro pledis por E-teatro. Post 4 jaroj en Smolensk junaj esperantistoj prezentis komedion de L.Tolstoj *Unua brandfaristo*, sekvis *La edziĝo kontraŭvola* de Molière, dum la unua UK. Kiom da prezentoj jam spektis esperantistoj dum la universalaj kaj landaj E-kongresoj! Jen estas ankoraŭ unu.

La filmo surprizis kaj kortuŝis min: longaj monologoj en perfekta Esperanto, preskaŭ 30 kantistoj kaj dancistoj, bonaj dekoracioj, kostumoj. Ĉu la aktoroj estas esperantistoj? Neimageble! Kion do mi faris? Tuj sendis mesaĝon al la **Nuova Compagnia** kaj jen kion mi eksciis. La rolantjo estas anoj de amatora teatro el vilaĝo Blera (3 mil loĝantoj), kaj komence de la filmo oni montras ĉi loketon kaj konatigas kun ĝia historio. Ĉefajn rolojn plenumas esperantistoj. Sanktan Franciskon ludas Pier Luigi Cinquantini, fama E-aktivulo, kiu iam organizis en Blera arkeologian E-brigadon kaj poste iniciatis la E-version de la muzikalo kaj tradukis al Esperanto la dialogojn. Li ankaŭ kunfondis **Nuova Compagnia**, kiu poste prezentis la spektaklon dum la IJK en Asizo (1987), kie iam Sankta Francisko fondis amason da monaĥejoj, kaj – dum Itala E-Kongreso en Frascati (1998). Aliajn ĉefajn rolojn brile plenumas Gianni Monaci, Laura Galli kaj Valeria Pagliari.

La muzikalo entenas 30 scenojn, el kiuj plejmulto estas muzikaj – atesto de la onidiro, ke en Italio preskaŭ ĉiu

scipovas kanti. Kelkaj melodioj ĝis nun konstante nestas en mia kapo. La tekstojn de la kantoj brile kaj sprite tradukis Giuseppe Castelli. Ekzemple la sepa sceno komenciĝas per marŝado de 12 monaĥoj, kiuj kantas: *Ni iru, ni iru: dudekvarpieda aro*.

Venu rapide homoj al la ĉefa plac, okazas vidinda spektakl: *al patro ĉion redonas Francisk!* Tiel komenciĝas la muzikalo: Francisko adiaŭas la patron por monaĥiĝi. Kaj tuj sekvas brila monologo de la patro Bernadone (Gianni Monacci) kaj lia dialogo kun la ĉifonulino (Laura Galli), plena de ŝercoj, kiuj restis same sukaj en Esperanta traduko. Interparoloj de tiuj ĉi du aktoroj, kies ludo estas brila, intermitigas muzikajn scenojn.

Mia amiko esperantisto, profesia muzikisto kaj talenta kantisto, kies opinio por mi estas grava, post spektado de la muzikalo diris nur: *Mi trovas nenium mankon, kiun oni povus mencii en la recenzo*. Ankaŭ al neesperantistoj mi montris la komedion kaj konstatis, ke al ili ĉiuj ĝi plaĉis. Tial mi rekomendas ĉi frandaĵon al la E-publiko. Ĝi taŭgas ankaŭ kiel propagandilo de la internacia lingvo al la ekstera publiko.

Ne nur la muziko, kant- kaj monologplenumoj estas laŭdindaj, ankaŭ la tekstoj estas senriproĉaj. UEA farus donacon al partoprenontoj de iu sekvonta UK, se ĝi regalus ilin per ĉi frandaĵo.

Sed ne atendu tion, aĉetu la filmon kaj ĝuu!

Zajdman Jefim



Bona ripozo - kun Simbiozo

Simbiozo – kant-albumo de F. Fonseca. Muziko kaj interpretado: F. Fonseca; versoj: G. Mattos. Brazilia: BEL, 2002. KD: 35:26 min. Kun tekstolibreto, 12 kantoj. Prezo: € 12,60.

Jen kantalbumo, en kiu F. Fonseca – konata interpretisto en Esperanto – prezentas sin ankaŭ kiel komponisto. La komponaĵoj estas tre variaj laŭforme, verkitaĵ por (plejparte) tre seriozaj versoj de G. Mattos. La aranĝoj estas diversspecaj (dominas, tamen, malrapida pensiga stilo, malgraŭ ke estas ankaŭ kelkaj “bolantaj” komponaĵoj), ĉiuj muzikaĵoj estas riĉaj harmonie kaj sufiĉe interesaj melodie. Foje, tamen, la muziko ŝajnas eĉ iom malhelpi al la versoj, kiel, ekz., en “Tago tropika” kaj en kelkaj “Miniaturaj”, ege ŝarĝitaj je poezia senco, kiun muziko apenaŭ povas fari ankoraŭ pli reliefa. En la vizaĝa komponaĵo “Simbiozo” – male – la formo tre kongruas kun la senco de la versaĵo (interrilato inter la muziko kaj la



parolo, kies simbiozo estas la kanto). La diskon kronas brila kanto *Jam temp' esta por vera*, la sola priesperanta ero en la albumo. La kanto interpretado estas tre plaĉa kaj agrabla; la simpatia tekstolibreto servas kiel fina plezuriga komponanto de la bonkvalita havindaĵo, kiu la disko ja estas.

Entute do la disko povas kontentigi multajn: la pensemuloj trovas en ĝi bonajn pensigajn versojn, la muzikemuloj – variajn kaj multkolorajn komponaĵojn. Kaj fine por ajna homo la medita muziko kaj altkvalitaj versoj helpas malstreĉiĝi kaj bone ripozigi. Do – ek al ripozo kun “Simbiozo”!

Pavel Moĵajev

Ne sufiĉas bonintenco

Marc Bavant (2002): *Les bases de l'espéranto d'après le fundamento*. Dobřichovice: Kava-Pech.115p. ISBN 80-85853-56-6. Prezo € 11,70; Włodzimierz Opoka (2002): *Basis of Esperanto*. Kraków: Umea Shinoda-Kuracejo. 40p. ISBN 83-908748-9-X. Prezo: € 3,30.

Al la aŭtoroj de la du recenzataj libretoj mi starigas Asimplan demandon: Kial? Sendube vi ambaŭ multe laboris, multe ŝvitis por realigi viajn projektojn; aliflanke ni vivas – almenaŭ mi vivas – en la fruaj jaroj de la 21-a jarcento, ne meze de la pasinta. Simple, tiuj ĉi du libretoj – unu esence por franclingvanoj, la alia por anglalingvanoj – kontribuas malmulton al nia kompreno pri Esperanto kaj nenion al ties pedagogio.

La Bavant-a *Les bases de l'espéranto d'après le fundamento* estas franclingva komentario pri la *Fundamento de Esperanto*. En sia antaŭparolo la aŭtoro informas, ke la libreto estas destinita al ĉiuj, kiuj deziras sintezan enkondukon al Esperanto kaj kiujn delogas nek la gramatika terminologio, nek la denseco de teksto (p.9). Jen la hoko: leganto, aparte komencanto, kiu neniam funde studis gramatikon (aŭ studis ĝin antaŭ multaj jaroj), tuj perdiĝos en gramatiko-ĝangalo. Sendube ekzistas lingvaj – por tiel diri – futbal-zelotoj (teduloj), al kiuj plaĉas elgurdi matĉo-statistikojn kaj pridemandi unu la alian tiel: *Kiu pafis la trian golon en la duaronda tut-eŭropa pokal-gajniinta pokalĉampionado de la jaro 19xx?* – nu, ekzistas lingvaj zelotoj, kiuj avide kaj dispecige kribros la komentojn de Bavant. Bone,



sed tiel oni ne – eĉ sinteze – enkonduku Esperanton. Ne, kara sinjoro, en post-gramatika, situaci-komunika kaj nun elektronike interaktiva eraco.

Simile la Opoka-a *Basis of Esperanto*. Per la libro la aŭtoro volas *pruvi, ke tiu ĉi lingvo estas facila* (p.3). Do jen – memevidente – la 16 reguloj (ve!); ankaŭ listoj pri gramatikaj finaĵoj, personaj pronomoj, konjugacioj, ktp, ktp. Do, kial? Informoj tiaj troviĝas en centoj da lernolibroj, broŝuroj kaj pamfletoj. Ĉu vere necesas nova? Kaj ĉu listoj tiaj *pruvas* la facilecon de Esperanto – kaj kiel kompreni *facila*? Krome aperas en la anglaj tradukoj pluraj bizaraj: *direktoro* fariĝas en la angla *head-manager* (kio?); mankas al *philharmonic* (tiel) kroma *h* (inter *l* kaj *a*); kaj *pli gravaj institucioj kaj lokoj* tradukiĝas per *institutions & places more important (more important staru antaŭ, ne post places; p.26)*. Se mi volus lerni Esperanton kaj trovus tian libreton, mi tuj senluziĝus: bazaj eraroj en la angla, kruda – propagando pri ia Umea Shinoda-kuracejo – diable! Mi turnus min senhezite al io pli normala – futbal-zelotado, ekzemple. Do libreto bonintenco – sed kiam ni esperantistoj lernos, ke foje bonintenco ne sufiĉas por antaŭenigi nian lingvon?

Paul Gubbins

Libera Folio: opozicia reta gazeto

La demisio de Nikola Rašić el sia posteno de Konstanta Kongresa Sekretario de UEA komencis viglan diskutadon en la retlisto de UEA-membroj kaj igis eksredaktoron de *Esperanto* István Ertl kaj eksestraron Kalle Kniivilä fondi interretan gazeton *Libera Folio*. UEA trovas sin en profunda krizo ili skribis en la unua eldono de la gazeto kaj plendis ke *pri la nuna krizo de UEA ne skribas ties oficiala organo. Libera Folio* celas *sobre kaj kritike prilumi aktualajn evoluojn en la Esperanto-movado*.

La gazeto ekaperis komence de aprilo, sed ĝi ne funkcias kiel tradicia gazeto kun distingeblaj numeroj. Male, ekzistas nur unu sola “numero” kiu konstante ĝisdatiĝas kaj tiam ankaŭ “la unua paĝo” (la unua retpaĝo) ŝanĝiĝas kaj la malnova malaperas.

Komence en *Libera Folio* aperis intervjuoj kun Nikola Rašić, Osmo Buller kaj diskuto inter Trevor Steele kaj Nikola Rašić. Krome aperis komentoj de konataj esperantistoj kaj ligoj al aliaj retejoj. Ĝis la komenco de majo aperis ankaŭ opinioj de kelkaj aliaj (i.a. Mark Fettes, Claude Piron kaj Ilja De Coster) pri la afero, raportoj pri la estrara kunsido en aprilo kaj, la unuan de majo, du intervjuoj kun Renato Corsetti. La materialo, kiu amasiĝis en la reta gazeto plenigus jam planan numeron de revuo *Esperanto*, sed en reta gazeto la spacomanko ne same senteblas kiel en tradicia gazeto.

Laŭ Osmo Buller la kialo de la demisioj estas en *malĝusta kaj damaĝa sinteno de gvidaj membroj de la nuna kaj antaŭa estraro al la rolo kaj funkciado de la Centra Oficejo*. Li ankaŭ kritikis ke *la estraro havis en si mem bonan intencan plifortigi eksteran agadon, unuavice la informadon (...) kaj sekve ĝi*

direktis multe da rimedoj por ĝi je la kosto de atento kaj rimedoj al la flegado de UEA kiel organizaĵo.

Renato Corsetti bedaŭras la demisio de Nikola Rašić, sed vere ne komprenas ĝian kaŭzon. Li agnoskas, ke oni devas fari ankoraŭ multon pri reorganizado de la oficejo. Corsetti ankaŭ akuzas ke raŭmismoj transprenis la potencan ankaŭ en UEA, dum li mem volus havi pli da finvenkismo aŭ – kiel li preferas diri “venkismo”.

Surbaze de la materialoj en *Libera Folio* ne estas facile difini kio finfine kaŭzis la malkonkordon inter oficistoj kaj la estraro. Oni parolas pri diversaj laborstiloj kaj prioritatoj, sed ofte mankas konkretaj ekzemploj. Tamen unu tre konkreta ekzemplo estas la estonteco de la Centra Oficejo, sed tiu

problemo fariĝis almenaŭ momente neaktuala pro la malfondo de Oficeja Komisiono en la aprila estrarkunsido. Ankaŭ la prezidanto Corsetti

diras, ke li komencas kompreni, ke neniu ŝatas la movon al *Samarkando* (=malpli kosta lando) kaj ke tiu movo, ankaŭ se ĝi venos, venos post longa tempo.

Dum sia unua ekzistomonato *Libera Folio* estis vizitata jam preskaŭ 3 000-foje kaj fariĝis unu el la plej rapidaj informejoj pri tio kio okazas ĉirkaŭ UEA kaj la Centra Oficejo. Iom bedaŭrinde, tiu ĉi fonto de informoj kaj opinioj ne estas atingebla por tiuj, kiuj ne havas aliron al interreto. Kvankam la artikoloj estas libere represeblaj, ne estas versajne, ke plejparto el ili aperus en paperaj gazetoj, simple pro manko de spaco. Espereble tamen la plej gravaj represigoj. Momente la retejo de la bulteno funkcias sub tiu de Kalle Kniivilä, sed la konstanta adreso de la gazeto estas daŭre <http://folio.xrs.net>.

Jukka Pietiläinen

Retkursoj: Ĉu taŭga metodo por instrui Esperanton?

interesan "problemon": lakvanto da korespondoj venantaj kadre de la porkomercanta kurso superis fortojn de la lingvohelpantoj. Tial oni devis malintensigi la varbadon de novaj uzantoj kaj ekserĉi pliajn helpantojn por la plej popularaj lingvoj de **lernu!**

La projekto **lernu!** ricevas subtenon de la fondaĵo Esperantic Studies Foundation, tiel ke pluraj teamanoj povas profesie prizorgi ĝin. *Pli frue mi rekomendis al la interesitoj librojn, menciis kursoliston kaj atentigis pri unu tre malnova korespondanta kurso, kiu origine estis papera kaj ne bone adaptita al la interreto. Hodiaŭ la situacio multe plibonigis, entuziasmas la germana lingvohelpanto Gunnar R. Fischer. Lernu.net certe estas ankoraŭ plibonigebla, sed ĝi jam bone funkcias kaj estas granda paŝo antaŭen. Malofte mi povas montri Esperanto-produktojn al homoj sen embaraso – sed jen brila escepto rilate al kvalito kaj kunlaboro de samideanoj. La retadreso de **lernu!** estas: <http://www.lernu.net>*

Ankaŭ la vasta **Rusio** ofertas Esperanto-retkurson por rusparolantoj. *Ĝi sin bazas sur la klasika ruslingva lernolibro de Boris Kolker. La kurso funkcias kiel retgrupo ĉe Yahoo, en kiu ĉiu lernanto ricevas la tutan stokon de la lecionoj tuj ĉe la aliĝo kaj po iomete faras taskojn kaj sendas ilin al la grupo. Iu el la instruistoj kontrolas – kaj sendas reen al la grupo ktp. La rezultoj estas bonaj, diras Slavik Ivanov. Ofte okazas reklamado en diversaj ruslingvaj dissendoj kaj forumoj. Nun en ĝi membras 315 personoj, detalas Ivanov. Por li la reto fariĝas la sola loko, kie li delonge kaj konstante instruas. Emfazon la rusoj donas al la didaktika koncepto. Fakte temas pri tre serioza kurso (20 lecionoj): Vere malmultaj homoj finas ĉiujn 20 lecionojn, sed tiuj malmultaj kutime iĝas (almenaŭ amatoraj) esperantologoj, vere, substrekas Ivanov. **La rusa retkurso:** <http://www.ikso.net/esperanto-kurso/>.*

La argentina kurso de Esperanto de la Instituto de Esperanto ekzistas ekde 2001. Ĝi estas kreita tre profesie kaj bonaspekte. Pli ol 50% de la lernantoj, jam pli ol 10 000, venas el hispanlingvaj landoj. Ĝi konsistas el 15 lecionoj, kaj estas tute senpaga. La lecionoj enhavas multajn demandojn, respondojn, dialogojn kaj esprimojn de la ĉiutaga vivo. Ĝi estas eminente praktika. Ĉiu leciono entenas glosaron, ekzercojn kaj respondojn kaj enhavas enkondukon al la literaturo de Esperanto. La lecionoj povas esti presitaj, kaj la kurso elŝutita al la malmola disko. Ĉiu versio de la kurso (havebla en 7 lingvoj) havas "instruistan estraron", al kiu la lernanto povas sendi mesaĝojn por fari demandojn, klarigas Marcelo Casartelli, la ĉefadministranto. **Argentina kurso de Esperanto:** <http://www.hzmj.org/e-kurso/index.htm>; <http://www.hzmj.org/e-kurso/index.htm> (por la ĉina versio); <http://www.institutoesperanto.com.ar> (por la aliaj versioj).

Transirante la Pacifikon ni venas al reta semajna tradukkurso *Syukan yasasii sakubun* (Semajna facila frazfarado). Ĉi tiu retkurso, kiun partoprenas ĉiusemajne dudeko da kursanoj, estas senpaga. Ĉiudimanche mi donas japanan frazon, kaj la kursanoj responstas al mi sian tradukon. La sekvan dimanĉon ili legas mian korekton kaj mi donas novan ekzerccfrazon, klarigas Saka Tadasu. Retkurso havas la avantaĝon ke mi povas verki komenton tiom longe kiom necesas. La retkurso de Saka celas doni al la kursanoj la kapablon esprimi sin en Esperanto komprenebla internacie. La tezo ke Esperanto malfacilas por japanoj parte trovas rekonon ĉe Saka: *La lingva substrato kaj ideoasocioj de japanoj tute diferencas de tiuj de eŭropanoj, kaj pro tio japanoj havas nenion por gardi sin kontraŭ misuzo de subtilaj vortoj devenantaj de la radikoj komunaj al ĉefaj eŭropaj lingvoj se*

ne troveblaj en vortaroj. **Semajna facila frazfarado:** <http://plaza.harmonix.ne.jp/~sakat/>

*En 2002 ni lanĉis retpoŝtan korespondan kurson en la hungara kaj espereble baldaŭ sekvos franca versio, diras Thierry Salomon, la prizorganto de la kurso de la firmao AbonaSoft BT. Retaj kursoj estas gravaj en instruopiano en Hungario, ĉar multaj volas lerni Esperanton – pro la deviga atestilo por diplomigi – kaj mankas instruantoj. Kie ekzistas sufiĉe da postulado, eĉ Esperanto povas iomete gajniĝi. Sekve AbonaSoft postulas por la 12 lecionoj, kun diplomoj je la fino, 8 000 hungarajn forintojn (25 eŭrojn). La didaktika koncepto estas neniel revolucia, sed kadre de la kurso oni uzas ankaŭ la adapteblan komputilan lernohepilon. Tiu plurlingva programo baziĝas sur demandoj. En la nova versio la demandoj povas esti ankaŭ sonoj aŭ bildoj. La ĉefa avantaĝo estas ke eblas mem facile aldoni novajn demandojn kaj intersanĝi ilin kun aliaj lernantoj/instruantoj, fieras Salomon pri sia produkto. **AbonaSoft-kurso:** <http://abonasoft.netfirms.com>*

Ankaŭ en interretaj listoj ekestas diskuto pri la reta lingvolernado. Sergeo el Israelo ekzemple opinias, ke hodiaŭ homoj ne nur emas serĉi pli facilajn vojojn lerni la lingvon, sed ankaŭ la pli malmultekostajn aŭ eĉ senkostajn. Tio estus tutmonda tendenco, valida ne nur rilate al Esperanto. Laŭ nia reta statistikoj la nombro de lanovaj gelemantoj estas kvin fojojn pli granda ol la samtempa nombro dum la lastaj du jaroj. La absoluta plimulto de tiuj novaj esperantoj aĝas malpli ol 25 jarojn – mi pensas ke tio rilatas al la fakto, ke pli aĝaj homoj trovas tiatipajn lernadon – pere de komputilo/interreto – pli komplika, filozofiumas Sergeo kaj aŭguras: *La futuro de Esperanto pli kaj pli – se ne nur – dependas de la tutmonda reto – kaj ni nepre devas utiligi ĝin por nia profito. Aŭ perdi la ŝancon ekzisti.*

La koston flankon substrekas la slovako Viliam Búr: *Certe homoj volas legi kaj lerni senpage. Ni vivas en la tempo de senpaga programaro, senpagaj libroj, senpage legeblaj novaĵoj. Ankaŭ Esperanto, la libera lingvo de la homaro, devas esti senpaga.*

Sed ĉu la lernantoj de Esperanto ankaŭ fariĝos esperantistoj? Fiman opinion pri tio havas Gunnar R. Fischer: *Kvankam homoj nun amase lernas Esperanton per interreto, ni plej verŝajne ne spertos fortan pozitivan membrokreskon pro tio. Nur 10% de la kursanoj entute veturas al renkontiĝo kaj vere praktikas la lingvon. Kaj en interreto, kie la homoj pli senzorge uzas kaj konsumas aferojn, verŝajne la procentaĵo estos eĉ pli malgranda. Ĉu kialo por rezigni? Laŭ Fischer ne: Ĉar ĉiu persono, kiu iam lernis Esperanton, normalokaze havas pli bonan opinion pri la lingvo. Kaj tian subtenon ni ja urĝe bezonas... Gravus resti "en kontakto" kun la homoj!*

Aparta "anekdoto" je la fino: Amiko antaŭ kelkaj tagoj rete reenkontis knabinon, kiu jam ekde tri jaroj partoprenas renkontiĝojn. Ŝi neniam kapablis paroli pli ol 1-2 frazojn kaj krom tio krokodilis kaj aligatoris. Sed post kiam ŝi malkovris interretan kurson, ŝi en unu semajno atingis rimarkeblan nivelon.

Kiaj konkludoj eblas? Estis aparte interese ekscii pri la diversaj retkursoj kaj ilia sukceso. Certe la prizorgantoj devas pli bone (kaj daŭre) plani kaj allogi novajn lernantojn. Retaj kursoj ŝajne ekhavas ĉiam pli kaj pli gravan rolon en la instrua laboro de esperantistoj tra la mondo. Ankoraŭ Nne estas studo pri la buĝeto de Esperanto-asocioj dediĉitaj al retaj kursoj, nek pri la tempo uzita por organizi kursojn. Eble tiu ĉi artikolo helpas doni la unuan malgrandan superrigardon. Ĉiuokaze praktika konsilo al esperantistoj, kiuj jam havas aŭ planas verki novajn kursojn: Kontakto unue la aliajn – kiel ekzemple la teamon de **lernu!** – kaj laboru kune. **Marko Naoki Lins**

Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv, atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokosto (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdanko pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Antropozofiaj gvidfrazoj. Rudolph Steiner. El la germana trad. Willy Nüesch. Berno: La tradukinto, 2003. 247p. 21cm. Antropozofiaj kontempladoj de R. Steiner, aperintaj en semajna gazeto inter jan. 1924 kaj apr. 1925. € 21,00

Bruna mateno. Franck Pavloff. El la franca trad. diversaj. Nantes: C.R., 2003. 11p. ISBN 2 9514747 3 3. 19cm. Charlie kaj lia amiko vivas en epoko konfuza, dum kreskas sistemo politike ekstrema: la Bruna Stato. € 2,40

Esperanto por deti. Jana Melicháková. Ilus. de Miroslava Tomečková. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2003. 73p. ISBN 80 85853 64 7. 20cm. Abunde ilustrita lernolibro por infanoj; kvankam parte en la ĉeĥa, uzebila internacie. € 5,10

Esperanto: Udzbenik medjunarodnog jezika. J. Cushing, S. Štimec, N. Rašić, Z. Tišjar. Zagreb: IKS, 1986. 41p. 21cm. Daŭriga (B) kurso de la zagreba metodo. € 4,50

Fakaj studoj en Esperanto.

Red. Zdeněk Pluhař. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2003. 146p. ISBN 80 85853 63 9. 20cm. Resumoj en la angla, germana kaj ĉeĥa. Pli ol dudek eseoj dividitaj en tri sekciojn: Elektronikaj rimedoj, Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto, Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko. € 16,50

Johano la Brava. Sándor Petőfi. En la ĉinan trad. Li Naixi. Ilus. de Béla Sándor. En Esperanton trad. K. Kalocsay. Wuhan: Hubeia E-Asocio, 1997. 64p. 21cm. Kvazaŭ popolfabelo en versio de la nacia poeto de Hungario, kun paralela ĉina traduko. € 9,00

Kantoj sur manplato. Uljanovsk: REU, 2001. 32+32p. 16cm. Tekstoj por trideko da kantoj el la tuta mondo, popularaj inter esperantistoj. € 1,80

Konciza etimologia vortaro. André Cherpillod. Roterdamo: UEA, 2003. 503p. ISBN 92 9017 082 4. 22cm. Bind. La etimologio de pli ol 15 000 Esperantaj vortoj, kun parencaĵ etimoj en pluraj lingvoj.

Ĉiuj fremdlingvaj vortoj skribitaj en la alfabeto de la koncerna lingvo. € 24,90. Triona rabato ekde tri ekz.

Legolibreto. El E-eretoj kolektitaj en diversaj lokoj por karaj amikoj. Red. J. Drahotová, M. Vaněk. Mladá Boleslav: Pánková, 2003. 91p. 21cm. Kelkdeko da legajoj antaŭe aperintaj en E-eldonajoj. Taŭga por komencantoj kaj por kursoj. € 6,00

Making World Peace Real: The Bahá'í Faith and Esperanto. Paul Desailly. 2003. 188p. ISBN 0 646 38643 3. 30cm. Ilus. Anglalingva. Ampleksa prezento de la Bahaa kredo kaj Esperanto kun aparta emfazo de iliaj interrilatoj tra la historio. € 9,90

Maljunologio. Scienco pri maljuniĝo kaj popularaj metodoj de sanigo kaj vivlongigo. Dinh Van Van. Seulo: I.N.A., 1997 (3-a eld). 119p. 20cm. Ilus. Popularaj



Oraj reguloj por la vivo ĉiutage. Omraam Mikhaél Aivanhov. El la franca trad. C. Piron. Fréjus: Prosveta, 2002. 139p. ISBN 2 85566 825 5. 18cm. Lernu rigardi la ĉiutagan vivon kiel materialon, kiun vi prilaboru por transformi ĝin. € 9,00

Rigardo al pasinteco. Poemaro. L. Arnaudova, L. Koson, P. Arnaudov. Pazarĝik: Radio, 2003. 39p. 20cm. Ilus. Kolekto de poemoj originalaj kaj, plejparte, tradukitaj. € 3,00

Ŝakludo, La. Trafuga rigardo. Pier Giorgio Soranzo. Bagnaria Arsa: La aŭtoro, 2001. 14p. 21cm. € 2,40

Ŝanĝado. Mao Zifu. Thaumiers: La Kancerkliniko, 1997. 18p. ISSN 0398-5822. 30cm. Ilus. 64 originalaj poemoj, publikigitaj kiel suplemento al *La Kancerkliniko*. € 4,50



aŭtoro, 2003. La tri volumoj de *Esperanto per iom...* sur unu komputila kompaktdisko en formato PDF. € 3,00

NoVa 2002. Solotronik. Málaga: La aŭtoro, 2002. Pli ol unu horo da muziko ritma kaj mesaĝriĉa; 17 pecoj. € 15,00

Porjunularaj rakontoj. Boris Jiřtkov. El la rusa trad. A. Kerbel. Hajfo: La tradukinto, 2002. Ok rakontoj sur komputila kompaktdisko, en formato PDF. € 3,00

Rejĵkjaviko 1977. Red. Ziko M. Sikosek. Rotterdam: UEA, 2003. La unua en serio titolita "Tiel sonis...". 73 min. Sondokumento el la 62-a UK, kun la voĉoj de H. Tonkin, R. Harry, B. Ragnarsson, A. M'Bow ka; M'Bow en la franca. € 9,90. Triona rabato ekde tri ekz.

Saluton al vi, doktoro Esperanto. Federico Bonetti Amendola. Rakontas Maria Rosa Valli, kantas Cristina Iannicola, pianludas Bonetti Amendola. Milano: IEF, 2002. 32 min. Kun tekstfolio.

*Melogoj** kaj ariroj pri poemoj de L.L. Zamenhof. € 11,10

Svedaj kantoj 2003. Kantas Eva Therstohl, pianludas Ulrika Henkelmann. 2003. 23 min. 9 svedaj kantoj registritaj en preĝejo; kvadatenkonduko al la muziko de la lando gastigata la 88-an UK. € 9,00 (*melodiaj dialogoj)



* **TOGOLANDO:** La 21-an de junio okazis trejnseminario en Akrao, Togolando, pri administrado de kluboj. La seminarion partoprenis 10 personoj el diversaj partoj de la lando. Antaŭ la seminario jam okazis teoria eduko pere de lernolibro pri adminstrado de kluboj. La nuna seminario estis praktika aldonaĵo al la konokoj.

* **KOREIO:** Ĝis nun la Universitato Dankook estis la ununura universitato, en kiu Esperanto estas instruata oficiale kiel lerno-objekto kun poentoj. La 23-an de junio 2003 ankaŭ la Universitato Wonkwang ekkondukis Esperanton kiel oficialan lerno-objekton. La lecionoj komenciĝos ekde la ĉi-jara septembra semestro. Gvidos ilin docento Lee Jung-kee. Universitato Wonkwang estis fondita surbaze de la religio ŭonbulismo. Gratulmesaĝoj estas bonvenaj ĉe: esperant@unitel.co.kr.

* **FRANCIO:** Ĉevalo nomata Zamenhof gajnis la 15-an de majo 2003 la ĉefan konkurson en Longchamp (*Prix du Bois de Boulogne/Premio de la Bulonja arbareto*), apud Parizo. La jokeo estis S. Pasquier.

* **KATALUNIO:** La kandidatoj de la kataluna partio Unuiĝo populara de Mataro (Unitat Popular de Mataró) adoptis Esperanton en la balotprogramo por la alproksimiĝanta urba voĉdonado. Laŭ la balotprogramo, la maldekstra kaj sendependa partio volas *garantii la ĉeeston de la internacia lingvo Esperanto en edukado, publikaj libroj, kaj uzi ĝin en internaciaj rilatoj kiel pontolingvon ekster la medio de romanĉaj (*latinidaj) lingvoj*. Legu la programon ĉe: http://www.cupmataro.org/principis/09_almon.html

* **SLOVENIO:** La televidstacio Net-TV en Maribor, Slovenio, elsendis la 12-an, 13-an kaj 14-an de junio unuoran diskuton pri *Eŭropa identeco kaj egalrajteco de nacioj en EU*. La elsendon gvidis la prezidantino de Esperanto-Societo de Maribor Melita Cimerman kaj gastoj estis Zlatko Tišljar, Vinko Ošlak (esperantistoj) kaj Janez Dular (eksa kulturministro de Slovenio). En la diskuto oni plurfoje menciis Esperanton kiel solvon por defendi malpli grandajn naciojn sub la danĝero de malapero en EU.

* **FINNLANDO:** Päätaalo-instituto, kultura-literatura centro en Taivalkoski, Norda Finnlando, organizas ĉiujare fabelkonkurson por infanoj. Ankaŭ ĉi-

jare la instituto invitas konkursi en Esperanto. Estas tri kategorioj: infanoj ĝis 9-jaraj; 10-11-jaraj kaj 12-13-jaraj. La konkursaĵoj estu verkitaj originale en Esperanto de infanoj aŭ grupoj (lernejaj klasoj). Individuajn kaj grupajn konkursaĵojn oni taksos aparte. Longeco ne estas fiksita. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco. En la prijuĝado oni aprezas antaŭ ĉio fabelecon kaj originalecon. La konkursaĵoj estu senditaj poŝte kaj alvenu plej laste la 15-an de septembro 2003 al: Päätaalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando. Oni uzu pseŭdonimon kaj menciui, ĉu temas pri grupo aŭ



* **AKADEMIOJ:** Antaŭ 250 personoj okazis la 15-an de julio 2003 en Niteroi, Brazilo, enpostenigo de Neide Barros Rego kiel akademiano ĉe *Academia Fluminense de Letras* en la fako *Belartoj*. La ĉefa temo de ŝia parolado estis E-o kaj Zamenhof. Ŝi eksplikis al la ĉeestantaro la devenon de E-o, ĝiajn ĉefajn aspektojn, detalojn pri la vivo de Zamenhof kaj nuntempa stato de la E-movado. Kiel kronon ŝi deklamis la poemon de Sylla Chaves *Kvin Dronintoj*, kiu trafte montras la lingvan problemon. La ĉeestantoj starante varme aplaudis ŝin.

* **FESTIVALOJ:** La drama sekcio de la Kroata Esperantista Unuiĝo denove sukcese prezentiĝis en la programo de Surstrata festivalo, kiu la lastan semajnon de junio 2003 okazis en Zagrebo. La drama sekcio prezentiĝis du-foje per spritaj skeĉoj tradukitaj el Esperanto.

* **ĜISDATE:** La dokumento *Ĝisdate pri Esperanto* nun legeblas en 24 lingvaj versioj. Utiligu kaj adaptu ĝin por informado al neesperantistoj. Se vi emas traduki en plian lingvon, proponu tion al komunikadcentro@esperanto.org. Jam estas tradukoj en la angla, bulgara, dana, Esperanto, estona, finna, franca, germana, greka, hispana, hungara, itala, kataluna, korea, litova, nederlanda, norvega (boksmal), pola, portugala,

unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto. La rezultojn oni publikigos la 18-an de oktobro. Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso: s-ino Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando. Rete: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi. Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, estas legeblaj en: www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm

* **BRAZILo:** *Esperanto, la Lingvo de Frateco*, estas la 4-a plej aŭskultata radioprogramo de la radistacio Rio-de-Janeiro inter 22 aliaj. La rezulto aperis en la lasta bulteno de IBOPE, la plej grava esplorad-instituto en Brazilo. Oni povas aŭskulti la programon ĉiumarde je la 3-a ptm, kaj ĉiuvendre je la 11-a vespere en www.radioriodejaneiro.am.br aŭ per 1400 kHz AM.



rumana, rusa, serba, slovaka kaj la sveda. <http://lingvo.org/xx/3/250>.

* **KAMPANJOJ:** Plenpaĝa reklamo pri Esperanto aperis en la ĵurnalo *Le Monde* la 14-a junio 2003 kadre de eŭropa kampanjo iniciatita kaj financita de esperantlingva japana mecenato. La malavara mecenato de la asocio Esperanto-France deziras progresigi la ideon de Esperanto en Eŭropo kaj li mem financas la aperon de kompleta paĝo en la ĉefa ĵurnalo de pluraj landoj.

* **ZEO-J:** Publika fruktoĝardeno apud Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, Svislando, ricevis la nomon Esperanto-ĝardeno. La nomiga ceremonio okazis la 13-an de julio 2003 dum la inaŭguro de la 76-a Kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda (SAT).

* **E-LIBREJO:** La e-librejon de www.esperanto.se vizitis jam pli ol 100 000 legantoj. La unuan pozicion okupas *La Eta Princo*. Plej multe oni legas diversajn popularajn tradukitajn verkojn. Inter la originalaĵoj la unuajn lokojn okupas verkoj de Zamenhof, Privat, Drezon kaj Neergaard. La unuan lokon inter originalaj verkoj de vivantaj aŭtoroj okupas *Ne nur Leteroj de Plumamikoj de M. Boulton* (598), la duan *Eŭropa Identeco de Z. Tišljar* (585) kaj la trian libro de Franko Luin *Spuroj de Miaj Paŝoj* (515).

MEMBRO-MEMBRON!

La varb-kampanjon MEMBRO-MEMBRON! partoprenis 13 personoj, kiuj akiris 57 novajn UEA-membrojn. (La cifero indikas la nombron de akiritaj membroj).

1. Eduard Kolosov, Rusio 17
2. Mario da Silva Resina, Brazilo.. 12
3. Christian Rivière, Francio 7
4. Denise Hubert, Francio 5
5. Luis Carlos Rusilo, Brazilo 4
6. Jaroslaw Miklasz, Pollando 4
7. Saka Tadasi, Japanio 2
8. Marija Belošević, Kroatio 1
9. Jean Michel Perdel, Francio 1
10. Torun Jansson, Svedio 1
11. Anna-Liisa Ali-Simola, Finnlando 1
12. Stano Marček, Slovakio 1
13. Magdaléna Feifíková, Slovakio.... 1

La konkursintoj ricevis valorajn libropremiojn. La *Novan Plenajn Ilustritan Vortaron* gajnis Eduard Kolosov kaj (lotumita) Mario da Silva Resina. Elkoran gratulon!

Sumo ĉi-jara: 1218,79.



* **ULRICH LINS,** en la jaroj 1989 ĝis 1995 vicprezidanto de nia Asocio kaj nun komitatano, fariĝas 60-jara la 4-an de aŭgusto. Ekde 1957 esperantisto, la rekunfondinto de la junulara grupo en Kolonjo (Rejnlando, Germanio) interalie organizis Internaciajn Seminariojn, al kiuj li sukcesis altiri eminentulojn kiel Lapenna kaj Laurat. De 1964 ĝis 1969 li estis Estrarano de TEJO kaj reprezentis ĝin la lastajn du jarojn ĉe la UEA-Estrarro; kvar jarojn post 1970 li redaktis *Kontakto* (kune kun Simo Milojević). La doktoriĝinto pri la japana Oomoto-movado estas nuntempe plej konata



1973: transdono de la materialoj por Esperanto en perspektivo, kun Lapenna kaj Direktoro Victor Sadler.



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Egiptio: Guy Penet.

SOCIETO ZAMENHOF 2003

Hispanio: Josep S. Franquesa. **Italio:** Maria T. Malatesta. **Litovio:** Paul K. Jegorovas. **Nederlando:** W.C. Keizer; Marc van Oostendorp.

NOVAJ PATRONOJ DE TEJO 2003

Nederlando: Marc van Oostendorp.

DONACOJ 2003 (EUR)

Ĝis la 31-a de majo

Fondaĵo Ameriko: Francio: D. Couturier 50,00; Japanio: K.Svozil 100,00; Meksiko: L.I. Raudon U. 47,55. **Nederlando:** R.Moerbeck 50,00. **Usono:** B.Maxey 47,55. *Sumo ĉi-jara: 585,10.*

Fondaĵo Azio: Japanio: Esperanto-Densyusyo Sue 14,64; EToSo 14,64; Y.Misawa 29,36; H.Okuda 21,96; R.Sasaki 14,64; T.Tadaiisi 43,93; Y.Yazaki 21,96. **Vietnamio:** L.T.Cao Truong 4,21. *Sumo ĉi-jara: 1081,76.*

Fondaĵo Canuto: Francio: Y. Vierende 50,00. *Sumo ĉi-jara: 1218,79.*

Fondaĵo Junularo: Anonime 10,00. *Sumo ĉi-jara: 417,85.*

Ĝenerala Kapitalo: **Nederlando:** W.A. Verloren van Themaat 116,31. *Sumo ĉi-jara: 8141,45.*

Kapitalo Afriko: **Britio:** A.Nonima 141,94. **Nederlando:** E-klubo Alkmaar 300,00. *Sumo ĉi-jara: 5074,90.*

Konto Afriko: **Finnlando:** B.Eriksson 10,00. **Francio:** J. Rapley 100,00. **Germanio:** B.Eichkorn 100,00. **Nederlando:** A.S. de Vries 3,95. *Sumo ĉi-jara: 1054,07.*

Konto Edukado/Wiŝter: **Francio:** J. Rapley 100,00. **Germanio:** D. Blanke 50,00. **Usono:** W.R. Harmon 25,01. *Sumo ĉi-jara: 249,01.*

Konto Espero: **Francio:** Y. Vierende 50,00. **Italio:** E.T. Ackerman 50,00. **Nederlando:** M. I. van der Horst 25,00; S.Starčević 50,00. **Norvegio:** Anonima 42,09. *Sumo ĉi-jara: 1497,18.*

Propaganda Konto: **Italio:** A. D' Attilio 100,00. *Sumo ĉi-jara: 100,00.*

Triamonda Kongresa Fondaĵo: **Belgio:** F. Witdoeck 100,00. **Francio:** J. Cruchon 11,76. *Sumo ĉi-jara: 3046,82.*

Anoncetoj

1 vorto = 1 internacia rpĉ (€ 0,75). Ni ne respondecas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. **Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Koresponda Servo Mondskala, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.**

Teniso: organizanto de E-kurso por tablotenisistoj de Junulara Sporta Centro en Jalto serĉas la kursorojn kontaktojn kun esperantistoj-tenisistoj: Jefim Zajdman, str. Kirova 26-14, UA-98600 Jalta, Ukrainio. jefim@uea.org; tero@yalta.ua.

500 diversaj Esperanto-stampoj kaj poŝtmarkoj. Ofertolisto kontraŭ 1 irk. aŭ egalvaloro. Aĉeto de poŝtmarkoj el la tuta mondo laŭ miaj aĉetlistoj: Neussner, DE-37284 Waldkappel, Germanio.

Tango-dancado: Lecionoj en Esperanto en Bonaero (Buenos Aires), aŭ ĉe vi: Ale Kosavela. ☎ XX-54-11-4325.2487, ✉ acossavella@argentina.com.

Muzeo de Harmonikoj en Malden, Nederlando, eldonis prospekton kaj aranĝas rondgvidadojn ankaŭ en Esperanto: De Muse, Kerkplein 12, NL-6581 AC Malden, Nederlando. ☎ +31-24.3584196, ☎ 388 1902, ✉ kuik@daxis.nl; www.accordeonmuseum.nl.



Fervojistoj kongresis en Saksio

Plenan semajnon (10-16 maj 03) pasigis 254 fervojistoj-esperantistoj el 19 landoj en la germana metropolo Dresdeno, dum la 55-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.



Foto: Stano Marček

Romano Bolognesi malfermas la 55-an IFEF-Kongreson en Dresdeno.

La programo, kiun kiel kutime favoris ankaŭ la vetero, estis vere bunta kaj interesa: fakajn prelegojn, kunsidojn de fakaj komisionoj kaj publikajn plenkunsidojn agrable alternis turismaj ekskursoj, nacia folkloro vespero kaj distraj vesperoj kun kantoj kaj dancoj.

La ĉefan prelegon *Teknikaj evoluoj por la estonto de la eŭropa fervojtrafiko* kompilis kaj prezentis Bodo Ehrlich. Pri la programo ĉiutage informis Kongresa Kuriero, redaktita de Stano Marček.

Dum la semajno okazis sep fakaj prelegoj, tri tuttagaj kaj tri duontagaj ekskursoj al Dresdeno, al palacoj kaj ĝardenoj de Pillnitz, ŝipa ekskurso sur Elbo al sablo-ŝtonaj montaroj Saksa Svisio kun konkerado de la fortikaĵo Bastei kaj vespermanĝo en subferdeka ŝipa restoracio, trajnveturo al Pirna kaj veturado sur vaporŝipo Meissen, konstruita en 1885. La venonta IFK okazos de la 8-a ĝis la 15-a de majo 2004 en Sopron, Hungario.

Stano Marček

Novajoj el Barcelono

Okaze de la Ferioj de Asocioj (*Firentitats*), organizitaj de la sekretario de Asocioj de la urbestro de Barcelono, en kiuj kunvenis 135 kulturaj kaj civitanaj asocioj, Barcelona Esperanto-Centro okazigis ekspozicion.

La ekspozicio konsistis el stando por kontakti interesiĝantojn, loko kun ekspoziciitaj afiŝoj pri universalaj, internaciaj kaj naciaj kongresoj, kaj du vitraj tabloj por montri la plej aktualajn E-librojn.

La Ferioj estis vizititaj de miloj da personoj. BEC disdonis 500 informilojn kaj akceptis aliĝojn por Somera E-Kurso en junio kaj julio 2003. Krom la ekspozicio estis aranĝita prelego fare de s-ro Martí Guerrero pri *La problemo de la lingvoj*.

En unu el la plej gravaj publikaj barcelonaj bibliotekoj Vapor Vell estis establita E-fako, kiu havas pli ol 60 verkojn: gramatikojn, vortarojn, romanojn, eseojn. La plej interesajn librojn donacis Luis Serrano, Giordano Moya, Marco Botella, la eldonejo Prosveta kaj Hispana Esperanto-Federacio.

Ĉe la inaŭguro la prezidanto de BEC S. Aragaj dankis ĉiujn kunlaborantojn kaj ĉeestantojn, post kio s-ro Martí Guerrero, gvidanto de la E-kurso en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono en Bellaterra, prelegis pri la temo *La Eŭropa Unuiĝo kaj la lingva problemo*.

Salvador Aragaj



Condominio Esperanto

Almir kaj Zilda Ferreira estas agemaj samideanoj, loĝantaj en Rio-de-Ĵaneiro. Ili ĉiel klopodas por disvastigi Esperanton. Antaŭ nelonge ili aĉetis novan apartamenton. Ĉar la apartamentaro ankoraŭ ne havis nomon, ili proponis al la entreprenoj, kiu vendas la apartamentojn, ke ili nomu ĝin *Condominio Esperanto* (*Kunproprietaja Esperanto*).

La propono estis varme akceptita kaj de la firmao kaj de la granda parto de la novaj proprietuloj, kaj estis aprobita en speciala kunveno kunvokita tiucele. La dokumento estis notarie registrita. *Condominio Esperanto* troviĝas ĉe strato Daniel Carneiro 128 en kvartalo Engenho de Dentro en Rio-de-Ĵaneiro. Almir kaj Zilda intertempe informis, ke la entreprenisto tiom ŝatis la proponon, ke li intencas nomi aliajn konstruotajn apartamentarojn per *Esperanto 2*, *Esperanto 3* ktp.

Aloísio Sartorato

Hungaroj en Tata

La 33-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso okazis la 17-an kaj 18-an de majo 2003 en la belega, je historiaj monumentoj riĉa urbeto Tata, situanta 70 kilometrojn nordokcidente de Budapeŝto.

La Loka Kongresa Komitato gvidata de Elizabeta Ködmön realigis la dutagan aranĝon plaĉe, kontentige kaj modele.

La kongreson partoprenis pli ol 150 ĉiugaĝaj personoj, venintaj el ĉiuj regionoj de la lando. Estis iom nekutime, ke malnovaj kaj konataj esperantistoj alvenis malpli ol al la antaŭaj kongresoj, male abundis la kontribuantoj al la kulturaj programoj – grandparte nur simpatiantoj. Estas tamen rimarkinde, ke ĉiuj estraranoj de HEA partoprenis la kongreson krom unu, kiu nun laboras eksterlande.

Estis korvarmige, ke reprezentantoj de diversaj tavoloj de la socio venis al nia festo. Dum la inaŭguro salutis la kongresanojn vicurbestro, iama ano de HEA. Ankaŭ la parlamentano de la urbo András Tóth, kiel malnova konatulo de la loka esperantista grupo, salutis nin.

Pri la kongreso jam la antaŭan tagon aperis informoj en ĵurnaloj kaj radioelsendoj, sed sabate dufoje venis ĵurnalistoj de la urba televido kaj de urba kaj regiona ĵurnaloj.

Inaŭgure prelegis Sándor Jakab, vicprezidanto de HEA pri tio, kion alportu hungaraj esperantistoj al Eŭropa Unio kaj kia povos esti tie la situacio de esperantistoj.

Oszkár Princz, la ĝenerala sekretario, analizis la ĉefajn tendencojn de la okdekaj kaj naŭdekaj jaroj de la ĵus pasinta

jarcento, kaj atentigis la partoprenantojn pri tio, ke ni vivas en unika jardeko de Eŭropo, kiam la en ĝi grandiganta Unio formas sian novan strukturon kaj serĉas komunan lingvon. Ni ne preterpasu ĉi tiun historian momenton.

En la diskuto – inter aliaj – parolis ankaŭ profesoro Ottó Haszpra, ano de Hungara Scienca Akademio, kiu per trafikaj argumentoj prezentis la en mono mezureblajn kostojn de la multlingveco, kompare al la solvo per unu lingvo, speciale konstruita por la celo de internacia komunikado. Fine de la plenkunsido plimulto de la partoprenantoj subtenis la inviton de esperantista grupo el la fama historia urbo Sárospatak ke ĝi organizu la venontjaran kongreson inter la 21-a kaj 23-a de majo 2004.

Posttagmeze Sándor Jakab malfermis ekspozicion de Esperantista Pentrista Grupo funkcianta en la urboj Tata kaj Tatabánya. Por la ekspozicio dudek artistoj transdonis siajn verkojn. Post la ekspozicio okazis prezento de du esperantilingvaj romanoj. La historion de la naskiĝo de la unua romano prezentis d-ro Endre Dudich, la verkinto de la nekutima biologia fantasto. La 106-paĝan origine esperantlingve verkitan romanon la verkinto surloke dediĉis al la unuaj aĉetantoj. La dua prezentita libro estis romano de la Nobel-premiito Imre Kertész. La libro aperis post kelkaj tagoj dank' al malavara subvencio de hungariĝinta esperantistino devenanta el Ĉinio Lin Nagy.

Dum la 33-a HEK la partoprenantoj povis ĝui krom la menciitaj programoj ankaŭ urborigardon, veturante per speciala lokomotivo, ruliĝanta sur gumaj radoj, unuhoran kulturalan programon, kongresan balon kaj ankaŭ fakajn kunsidojn. Kompreneble ili povis aĉeti apartamentojn dum la tuta daŭro de la kongreso.

Oszkár Princz

Subtenu E-movadon en Afriko!


En la kvara numero de *Kontakto* publikiĝos la respondoj al la konkurso *Cu vi konas Sud-Afrikon?* lanĉita en la numero 192 (2002:6). La numero estas parte dediĉita al Afriko, sed la ĉefa numero, kiu traktos tiun temon, estos la unua en 2004. Kontribuu al tiu numero ankaŭ vi (la aŭtorojn atendas valoraj premioj)! Kontaktu la redakcion rete <kontakto@tejo.org> aŭ poŝte: Jenja Zvereva (Kontakto), p/k 89, UA-01030 Kijiv, Ukrainio.

oni ŝatus presi iom pli da ekzempleroj kaj sendi ilin al esperantistoj en Afriko, el kiuj multaj unuafoje havos la revuon en siaj manoj. Se vi ŝatus helpi realigi tiun ideon, sendu vian mon-kontribuon al la konto de UEA (vidu la Jarlibron), kun la indiko *Kontakto-Afriko*. Helpu afrikajn esperantistojn ricevi tiun numeron, kiu promesas esti vere bunta, alloga kaj interesa!

La temo de la tria numero de *Kontakto* estas *Vojaĝoj – antaŭaj kaj nuntempaj, esperantistaj kaj ne*. Na maltrafu ĝin!

Por aboni *Kontakto* turnu vin al la CO de UEA. Por ricevi senpagan prov-ekzempleron sendu mesaĝon kun via adreso al la CO de TEJO: <oficejo@tejo.org>.

Jenja Zvereva
redaktoro de *Kontakto*



Frank Buckley (1914 - 2003), dumviva membro de UEA kaj de Brita E-Asocio, diplomito de Brita E-Asocio kaj de Internacia Cseh-Instituto, fervora propaganto de E en multaj landoj, mortis en Bristol (Britio).

Peter Danning (1928-2002), delegito, fakdelegito, fondinto de Ligo de Samsksamaj Geesperantistoj (1977), mortis pasintan oktobron en Richmond (Britio). Li estis membro de la Londona E-Klubo kaj kasisto de la Sudorienta Federacio.

Eurricco Figueira (1933 - 2003), D de UEA, forpasis la 30-an de marto en Taubate, Brazilo.

François Garrigue (1911-2003), vicdelegito (1958-59) kaj delegito (1960-91), mortis en Rognes (Francio).

Walter Giannini-Aeppli (1914-2003), membro de UEA, Svisa E-Societo (SES), KELI

kaj de Zurika E-Societo, kiun li prezidis, forpasis la 9-an de aprilo.

Salvator Gumà (1901 - 2003), E-instruisto kaj verkisto, forpasis la 22-an de majo 2003 en la aĝo de 101 jaroj.

Gerard van der Horst (1924 - 2003), la edzo de Mila van der Horst-Kolinska, forpasis la 13-an de aprilo en Hago, Nederlando. Li estis kunlaboranto de SAT, TANEF kaj E-radioelsendoj.

Signe Korstvedt (1911-2003) kunfondis E-klubon en Horten, kasisto en la E-klubo en Oslo, sekretario de Norvega E-Ligo kaj estrarano/anstataŭanto (1979-85). De 2001 honora membro de NEL, mortis en Oslo.

Edward Lindberg (1911 - 2003), dumviva membro, fakdelegito pri astronomio kaj radio-

amatorismo, mortis en Bowmansville (Usono).

Li Naixi (1908-2003), ĝenerala direktoro de la Ĉina E-Ligo, gvidis eldonadon de *El Popola Ĉinio*, laboris por Radio Pekino (posta Ĉina Radio Internacia), ĉefredaktis *La Mondo* (la organo de la Ĉina E-Ligo).

Wilhelm Theodor Oeste (1913-2002), membro de 1954, delegito, mortis en Sintra (Portugalia) la 17-an de oktobro. Li tradukis Esperanten la kompletan version de kanzonoj de Schubert (Lieder).

Alberto Solarz (1917-2003), aktiva esperantisto en Venezuelo kaj Francio ekde 1935, delegito kaj vicdelegito, forpasis en Parizo.

Alfred Wenger (1917 - 2003), dumviva membro, fakdelegito pri medicino (1964-83), mortis en Chez-le-Bart (Svislando).

Krucenigma konkurso

La kaŝitan proverbon bv. sendi maksimume tri monatojn post la apero (poŝte, fakse aŭ rete) al la redakcio. Unu el la solvintoj (decidus lotumado) ricevos libropremion. Solvo el la januara revuo: *Mano pekis, dorso pagas. Ne ĉio griza estas lupo.*

La solvojn sendis: Aikawa Setuko, Japanio; Aira Røentynen, Finnlando; Albrecht Kronenberg, Germanio; Alfonso Soarez, Brazilo; Andrée Léval, Francio; Angus Wilkinson, Britio; Aoyama Tooru, Japanio; Carlos Eduardo de Oliveira, Brazilo; Celio A.S. Brandão, Brazilo; Christian Rivière, Francio; Christoph Brandes, Germanio; Daniel Luez, Francio; Denise Hubert, Francio; Dezusto Franklino, Nederlando; Dieter Dungert, Germanio; Edmund Grimley Evans, Britio; Erkki Kemppainen, Finnlando; Ester Olsen, Norvegio; František Štoviček, Ĉeĥio; Gerrit Brons, Nederlando; Gérard Labasthe, Francio; Grethe Kvist, Danlando; Grozdenka Filipova, Bulgario; Hazel Green, Aŭstralio; J. Ducrocq, Francio; Jackie Huberdeau, Francio; Jean Pierre Vandendaele, Belgio; Jean-Luc Tortel, Francio; Jean-Marie Ries, Luksemburgio; Jean-Thierry von Büren, Svislando; José Mauro Progiante, Brazilo; Jurij Petrovič Kivajev, Rusio; Karin Lenčí, Germanio; Kees Neeff, Nederlando; Ken Keable, Irlando; Kitty Sicherman, Israelo; Leon-Pierre Garden, Francio; Lucien Giloteaux, Francio; Luiza Marin, Francio; M. Paul Lafont, Francio; Manuel Casanoves, Hispanio; Marie-Thérèse Lloancy, Francio; Martin Purdy, Nov-Zelando; Masseron Odile, Francio; Medgyes Béla, Hungario; Mihailo Nešić, Serbio-Montenegro; Milan Směly, Ĉeĥio; Neil MacKilligin, Britio; Nora Caragea, Germanio; Pieter Jan Doumen, Belgio; Rigault Larise, Francio; Roland Cuenot, Francio; Ronald Gates, Aŭstralio; Rune Moln, Svedio; Sonja Brun, Svislando; Tatjana Auderskaja, Ukrainio; Tibor Veress, Hungario; Valentin Melnikov, Rusio; Werner Bormann, Germanio; W. R. Harmon, Usono; Zdeněk Hřel, Ĉeĥio; J. Pauluk, Brazilo; Renato Petrovič, Jugoslavio; Vladimir Gakalenko, Ukrainio; Douglas Kershaw, Anglio; Wanderley Vieira, Brazilo; Bert Schumann, Francio; Germain Pirlot, Belgio; Neal McKown, Usono; Vicente Durco, Brazilo; C. A. Schrives, Britio; Jiří Patera, Ĉeĥio; Helmuth Schenk, Brazilo; Keyhan Sayadpour, Irano. **La libropremion gajnis:** Neil MacKilligin el Britio. Elkoran gratulon!

UEA	UNUA PARTO DE LA KASPRAZO	UEA	ADVERBA FINAJO	LETONA E-ASOCIO	POST-KARTO	KRISTO EL ROBO	ORGANO DE AŬD-KAPABLO	DUA PARTO DE LA KASPRAZO
ADJER-TIVA FINAJO	GRUPENDA PIRK-REKATA AL ORIENTA LANTO							
LINGVA KOM-FAJO		ROMENCI PASI TRABO POR VELO						
MAL-PORTA-CERTA-GRADA					HAB-SERĈIL-FAMA SVISA ESP-ISTO			
KOLEE-TIVA-GRUPO				PART DE MANO KOM-PLITAN				
LOĜI SUR ARBO (PRI BERDOJ)						AVIADELA SIMBO DE JAŬSTRIBO SVARMO		
MEM-HOMPREN EBLA							METRO FIRMA OPINT	
LA TRIA TERSO	DEVAN SALTITO ANTAL FORBO							
MEMBRO-ADON-ANĈO		ANAS-MANIERE SERSE IMPULSA						
URH SUR ARABA DROG-INSULO						SINGAPURA E-ASOCIO ĈEĤEKA LATER		
ANTIKVA BERD-INS-TRUMENT				THUNK-ORGANAS-ENFLAM-IGA				
REKATA AL BRIGNO EN AZRO						SIMBOL-DE TALBO FRAKC-AR		
MAL-GRANDA AUTO-MOBILE							SIMB-DE AMPEHO MEMBRE	
LA 26-A LITENO	NE PLI MELTE OL SUFRISO (PREĈET)							
PREPO-ZICIO			FORA MONTREZ SIMBOL-DE BOBO					
RELARA AL MULTAJ DOMOJ								RUSIA E-ISTA UNDO

Aŭtoro: Stano Marček

HELPO DE SEPSA KATEJ

lernu per esperanto pri...

... kosmo



Astronomia almanako 2002. De la Sunsisistemo eksteren. Red. Alex. Mikišev. Astronomia E-Klubo, 2002. Lernu pri sunsisistemoj, planedoj, falantaj steloj, astroj kaj astro-nomoj. 56p. 21cm. Ilus. € 12,00.

... vetero



Vetero kaj klimato de la mondo. Denis Riley kaj Lewis Spolton. Trad. Kris Long. Rotterdam: UEA, 1987. Familiariĝu kun: ĝenerala meteologio, sinoptika meteologio kaj klimatologio. 132p. 25cm. Ilus. € 7,80.

... plantoj



La vivo de la plantoj. Paul Neergaard. La Laguna: J. Régulo, 1957. Eniru en la fascinajn kaj diversajn mondon de la plantoj. Kun glosaro kaj indekso. 126p. 25 cm. Ilus. € 6,90.

... informadiko



Infoduktoj. Luc De Brabandere. Trad. el la franca kaj nederlanda. Rotterdam: UEA, 1988. Rigardu al la komputila revolucio: kiel eblas akordigi ĝin kun la "verda" aŭ alternativa teknologio? 142p. 21 cm. € 2,70.

triona rabato por kia ajn kombino de tri libroj ĉi-supraj (identaj aŭ ne)!